5-a Jaro. N-o 241 APERAS



SEMAJNE 16. Majo 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti	SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e	ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

DEKLARO DE LA SAT-DIREKCIO

Dum la kvin lastaj monatoj, oni povis legi sur la paĝoj de nia gazeto plej diversajn opiniojn pri la program-afero. El tiu larĝa debato kaj el la multaj leteroj, kiujn ni ricevis pri tiu demando, evidentiĝis, ke la granda plimulto da SAT-anoj opinias, ke nia Statuto plene sufiĉas kiel gvidilo; ke nuntempa akcepto de programo povus nur esti kaŭzo de malpaco kaj disiĝo en niaj vicoj.

Aliparte la Programkomisiono ĝis nun ne havigis al ni alian projekton de programo, kiu povus esti pli akceptinda ol la jam prezentita. Ni konjektas el tio, ke eĉ la programproponintoj rezignas mem sian entreprenon. Tiu senaktiveco de la Programkomisiono estas signo, ke venis la horo de ĝia likvidiĝo, kiel jam proponis K-do *2978* k. a. Ni do povus simple deklari, ke ni konsideras la problemon solvita per forlaso de la proplemo mem. Sed ni lasu al la venonta Kongreso la zorgon findecidi pri tio. Dume ni ŝuldas al la tuta SAT-anaro klarigojn pri nia sinteno en tiu afero.

Kiel ni jam diris en la antaŭparolo al la unua materialo publikigita pri tiu temo (vidu "S-ulo", n-o *222*, *3*. januaro *1929*) ŝajnas, ke kelkiuj volas bonuzi la okazon, ne por defendi la proponitan programon, sed por ataki la Direkcion de SAT kaj kulpigi ĝin pri ni ne scias kia "reviziado".

Tia akuzo estas grava. Nia membraro ja devas scii, ĉu ni fakte celas aliigi niajn gvidprincipojn, ĉu ni volas ŝanĝi la direkton kaj la celon de nia Asocio. Ni do parolu klare kaj nete.

Unue ni rimarkigu, ke reviziado en si mem ne estas krimo. Ekzemple, neniu povas prave riproĉi al Lenin, ke li "reviziadis", kiam li iniciatis en Sovetio N o v a n E k o n o m i a n P o l i t i k o n (NEP). Kiam ŝanĝiĝis la objektivaj kondiĉoj, en kiuj malvolviĝas iu socia movado, estas la devo de ties gvidantoj adaptiĝi al la nova situacio. Sed tia adaptiĝo, tia ŝanĝo en la taktiko devas okazi tute malkaŝe. Se ni opinius, ke la celo kaj taskoj, kiujn ni difinis al SAT, tuj ĉe la komenco, ne plu akordiĝas kun la nuntempaj kondiĉoj, ekzistantaj en la laborista movado t u t m o n d a, ni certe proponus la ŝanĝon de la Statuto; ni senĝene proponus "reviziadon". Sed ni havas male la firman konvinkon, ke niaj ĝisnunaj gvidprincipoj restas ankoraŭ la sole ĝustaj kaj kondiĉas la prosperon de la laborista esperanta movado, konsidere ĝian tutmondecon.

Alia rimarko sin trudas: ĉu ne estas stranga la fakto, ke oni ne riproĉas al la Direkcio ĝian kontraŭstaron al la proponita programo, sed nur la argumentojn, per kiuj ĝi montris ties neakcepteblecon? La kritikantoj konfesas, ke la proponita kaj dum tri jaroj cerbumita kaj diskutita teksto estas ne taŭga; ili plie aldonas, ke estas preferinde rezigni la alprenon de soci-politika programo. Tio fakte signifas, ke la Direkcio tute pravis, kontraŭstarante la alprenon de la proponita teksto. Sed, jen oni riproĉas la argumentojn, per kiuj ni kontraŭstaris al la nedezirinda programo. Kaj tio sonas kvazaŭ oni dirus: "Vi bone faris forbalaante netaŭgaĵon, sed via balailo estas malbona." Se la K-doj, kiuj kritikas la "rimarkojn", estus konsekvencaj, ili ja devus ne riproĉi, sed mâle diri danke: "Vi faris bonan laboron per malbonaj iloj, vi estas pro tio despli gratulindaj!"

Ĉar tiel ili ne parolas, estas certe pro tio, ke ili havas nekonfesindajn motivojn por kritiki kaj bonuzas tiucele ĉiajn p r e t e k s t o j n. Necesas do, ke ni ekzamenu la riproĉojn, kiujn niaj Moskvaj K-doj Drezen, Modenov, Javoronkov, Breslaŭ kaj Jodko faris en la n-o *222* de "S-ulo".

Ni malatentu la tonon kaj la dirojn, kiuj celas kredigi, ke la Direkcio de SAT konsistas el malkleruloj, kiuj eĉ ne povas kompreni ideojn "konfesataj de Zamenhof mem". Ni ja ĉiuj estas modestaj laboruloj, kiuj posedas nur simplan saĝon por sin direkti en la batalo por siaj klasaj interesoj. Sed ni estas firme konvinkitaj, ke tiu nia simpla saĝo pli bone gvidas nin ol la konsiloj de ia ajn "inteligenzia".

Ni ankaŭ malatentu kelkajn punktojn, pri kiuj la legantoj povis akiri komprenon dum la okazinta diskutado. Ni nur ekzamenos, ĉu la riproĉo al ni direktita pri "reviziado" sin bazas sur faktoj aŭ ĉu ĝi estas simpla kalumnio. Tia ekzamenado kondukos nin al neatendita konkludo, nome, ke ne la Direkcio volas "revizii", sed ke la veraj reviziemuloj estas niaj kritikantoj mem.

Por ke ĉiu povu bone kompreni la problemon, necesas citi kelkajn partojn el la manifesto, per kiu la fondintoj de SAT sin turnis al la Laborista Esperantistaro. Tiu dokumento titoliĝas: "Liberiga Stelo al la Verdruĝuloj!" Ĝi aperis en la gazeto "Esperantista Laboristo", nov. 1920: "... "Liberiga Stelo" ... unue deklaras, ke, en sociologiaj tezoj, neniu kapablas demonstri kia estas la plej bona el la rimedoj uzotaj por pacigi la mondon. Nur la praktika provado povas aŭ ne pravigi iun ajn tezon."

— — — — — — — — —

... "Liberiga Stelo" kondamnas la senjustan principon de la kapitalista sistemo vortigebla jene: k i u h a v a s m o n o n, t i u m a n ĝ a s. Tiel oni povas vidi personojn, kiuj nenion utilan faras, sed tamen abundege konsumas, tial ke ili havas monon!

"Liberiga Stelo" estas k o n t r a ŭ - k a p i t a l i s t a.

"Al tia senjusta principo ĝi opozas (kontraŭmetas) la jenan: n u r t i u (sana) m a n ĝ a s, k i u l a b o r a s. Tiu lasta postulato estas la bazo mem de la socialismo, aŭ komunismo.

"Do, 'Liberiga Stelo' estas s o c i a l i s t a[1].

"Ĝi tute diferenciĝas je la nure pacifistaj asocioj, kiuj ne celas unue regigi justecon inter la homoj kaj kontentiĝas per vanaj paroloj prediki pacon al la popoloj. La pacifistoj estas eble bonkoraj homoj, sed ili fermas la okulojn por ne vidi la verajn militkaŭzojn. La

---

[1] Tiu termino entenas ĉiujn tendencojn de la laborista movado.

milito latente ekzistas ĉiam inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. Veran pacon povas nur havi socia ordo bazita sur justeco, egaleco, aŭ, se oni preferas, sur ekvivalenteco. Maljusteco estante ĉe la fundamento de la nuna socia sistemo, estas do tute logike, ke maljusteco ankaŭ regu la rilatojn inter la homaj grupiĝoj, ĉu naciaj, ĉu ŝtataj, kaj okazigu militojn. Tial la nure pacifista movado estas tute iluziplena kaj pro tio povas eĉ esti danĝera.

"Nia pozicio.

"Dirinte tion por montri nian komprenon pri la sociaj fenomenoj, temas nun difini la pozicion de "Liberiga Stelo" rilate al la diversaj organizoj, kiuj havas similan koncepton kaj batalas por renversi la kapitalistan ordon.

"Kiel jam ni diris, neniu povas havi absolutan certecon pri la plej trafaj rimedoj uzotaj. Konsekvence, ĉar nia tasko ne estas senpere batali kontraŭ la materiaj fortoj de la nuna socio, ni ne intencas elekti inter la diversaj partioj, organizoj aŭ tendencoj.

"Liberiga Stelo" alvokas la sincerulojn, bonvolulojn el ĉiuj samcelaj partioj.

"Nia tasko.

"Kia do estos la tasko de la 'liberigstelanoj'?

"Ĝi estos batali kontraŭ la spiritaj, moralaj fortoj, kiuj subtenas la senjustan, ĥaosan reĝimon kapitalistan. La tasko de "Liberiga Stelo" estos zorgi pri la kreado de spiritstato, kiu harmonios kun la estonta socio — kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj kaj ŝtataj landlimoj ne plu ekzistos.

"La ideala socio ne devenos tute preta el la Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Oni anstataŭas bone ion nur metante je ĝia loko alion pli perfektan. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi al la tasko de mondcivitano, forigante el si mem la nenaturajn naciecojn, kiujn la ŝtata edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapojn kaj korojn."

— — — — — — — — —

"Samlingveco.

"La demando estas jena: ĉu la nacioj estas la lasta grado de la evoluo ĉe la homaj socioj? Ĉu do, kiam unu sola helpa lingvo estos parolata de ĉiuj en la mondo, oni devos tamen ankoraŭ konservi la nunan formon por la rilatoj inter la homgrupiĝoj? Kiu aŭdacus (kuraĝus) respondi jese?

"Ni opinias, ke la estontaj organizoj estos profesiaj aŭ fakaj kaj tutmondaj, ne "internaciaj". La nacio en tiu estonta tempo estos rigardata proksimume kiel estas nune la provincoj en la nacioj.

"Pro tiuj konsideroj, ŝajnas al ni, esperantistoj, nepre necese tuj komenci la starigon de organizo funkcianta kiel plej estos eble laŭ la direkto montrita al ni de la historia evoluado ĉe la socioj. Oni trafe agas — eĉ senbrue — kiam oni klopodas laŭdirekte al la estonto. Sed kiuj marŝas ne gvidate de la liberiga stelo montranta la estonton, tiuj samloke paŝadas kaj senkonscie malhelpas la antaŭeniradon.

"Tial ke ekzistas nuntempe nacioj kaj ŝtatoj, ni bone scias, ke la naciaj socíetoj estas necesaj por difinite malampleksaj celoj. 'Liberiga Stelo' ne intencas do malhelpi la fondon de naciaj organizoj aŭ detrui la ekzistantajn. Sed, ĉar ni estas samlingvanoj, ni volas tuj profiti tiun rimedon por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio. Pro tio ke la naciaj asocioj estas nun necesaj de tio ne sekvas, ke ili devas esti la ĉelo de tutmonda asocio de samlingvanoj. Ni deziras, de nun, krei sennaciecan popolon. Ni volas, ke ĝi senprokraste kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo."

— — — — — — — — —

Kiel oni vidas, antaŭ naŭ jaroj, same kiel nun, ni celis arigi en la saman Asocion la esperantistajn laboristojn el ĉiuj tendencoj; same kiel nun la sennacieco rilatis nur al la organizformo de nia Asocio, kaj ni ne celis difini al ĝi kiel oficialan taskon la propagandon de sennaciismo; same kiel nun ni konsentis "ke naciaj societoj estas necesaj por difinite malampleksaj celoj" (Tion ni memorigas aparte por montri la malpravecon de anglaj SAT-anoj, kiuj riproĉas, ke ni perfidas la sennaciismon per nia subteno al B. L. E. A.); same kiel nun ni celis, ke reprezentantoj el ĉiuj tendencoj havu liberan voĉon por defendi sian propran vidpunkton laŭ deca maniero. En tiu manifesto ne estas parolite, ke SAT devas batali kontraŭ la imperialismo aŭ devas agnoski iun ajn el la agitvortoj aŭ taktikoj de la laboristaj organizoj.

Oni ne forgesu, ke en la j. 1920 la laborista movado ne estis tiom disigita kiel nuntempe. Kaj sekve, hodiaŭ pli ol iam ajn nia vidpunkto estas ĝusta.

Sed, sendube diros kelkiuj, tiu manifesto ne havas oficialan karakteron. Prave. Ni citis el ĝi, por ke ĉiu konstatu, ke la fondintoj de SAT havis la saman spiritostaton kiel nun.

Ĉiu sincerulo certe konsentos, ke tio estas sufiĉe atentinda por juĝi ĉu la akuzoj pri "reviziado" direktataj al ni estas ĝustaj, aŭ ĉu ili estas nur elpensitaj por atingi celon de ni nekonatan.

Kaj nun ni citu kelke da tipaj frazoj el la rezolucioj de niaj kongresoj kaj sekve havantaj oficialan karakteron. En la Rezolucio voĉdonita en Praha ĉe la fonda kongreso de SAT ni trovas jenon:

— — — — — — — — —

"Konsiderante, duaflanke:

a) Ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas **neniel esti politika,** ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizoj.

b) Ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esperanto — ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj — ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizoj, ariĝu en unu solan Asocion por montri al la Proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilege estas esperanto por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo:

Ĉe la III-a Kongreso en Cassel:

"Konsiderante unuaflanke:...

"b) Ke ĉiu membro de SAT (ĉu komunisto, ĉu socialisto, ĉu sindikatisto, ĉu anarkisto) povas kaj eĉ devas uzi la praktikajn servojn de nia Asocio profite al sia aparta organizo, ĉu politika, ĉu laborista;

"Deklaras, ke nia peresperanta organizo devas konservi kaj eĉ akcenti sian kulturan, teknikan, laboristservan karakteron; aliel ĝi ne estus vivpova kaj eĉ ne havus vivpravecon, vivrajtecon;

"Malaprobas, konsekvence, ĉian emon enŝovi en nia Asocio la disputpunktojn, kiuj disigas nuntempe la diversajn klasbatalajn organizojn."

(Fino en la venonta n-o.)

PRI LA MEZGERMANIA INDUSTRIREGIONO

(Fino. Vidu antaŭan n-on)

La salajroj en la ĥemia industrio estas iom pli bonaj ol en la brunkarba minejaro. La sistema pelado al laboro, la denuncado, la kaŝesplorado pri pensmaniero estas samaj kiel en la minejaro. Kaj rigardante la higienajn cirkonstancojn, ĝuste en Lojna oni devas konstati, ke kvazaŭ neniu industrio estas tiele subfosanta la sanon de la laboristaro, kiel la ĥemia. Eĉ la burĝa gazetaro, al kiu oni permesis komence de ĉi tiu jaro, bone preparitan en rigardon, ne povis fari ion alian ol konstati la fakton.


Ne estu forgesata ankaŭ la eksplodilfabriko Rajnsdorf (Reinsdorf) lokita en nia mastruma distrikto. Ĝi estas la sola fabriko en Germanio, en kiu sub kontrolo de la Entente-komisiono povas esti produktataj en pli grandaj kvantoj eksplodiloj kaj municio por la regna armeo kaj policaro.

La minejaro kaj ĥemia industrio karakterizas la mezgermanian distrikton, sed en la ombro de la ĥemiaj gigantoj, vaste disbranĉita maŝin-industrio okupas multajn milojn da laboristoj. Oni apenaŭ trovas iom grandan urbon en Mezgermanio, en kiu ne estus iu fabriko okupanta sin per la konstruado de maŝinoj kaj produktado de laboriloj.

Pli ankoraŭ ol la industrio de Mezgermanio superas ĝia agrikulturo la tutgermanian. En la Halle-a distrikto loĝas proksimume 500 mil homoj, el kiuj estas okupataj ĉirkaŭe la duono en la industrio kaj 30% en la agrikulturo. La restaj 20% okupiĝas en komercado kaj metiejoj. Sed la plej esenca estas, ke en neniu distrikto de Germanio tiel ampleksa estas la aplikado de maŝinoj kaj sterkoj, de scienco kaj tekniko, kiel en la mezgermania. Ĉi tie 70% de la tuta tero estas kulturata kamparo, dum la tutregna meznormo estas nur 50%.

La klasbatala historio de l' regiono

La antaŭaj linioj al vi konigis la ĝeneralan karakteron de Mezgermanio, kaj la sekvontaj rakontu al vi malmulte pri la klasbatala periodo postmilita. La centro de la klasbataloj mezgermaniaj estis, eĉ jam dum la milito, la Lojna-fabriko. En aŭgusto de la jaro 1917 okazis la unua striko en ĉi tiu "fabrik-ego" pro la aĉeco de liveritaj manĝaĵoj. Tiam dumil gelaboristoj marŝadis al la proksima urbo Merseburg por manifestacii. Mi mem kiel 14-jarulo estis inter ili. Poste la Lojna-proletaro estis konstante ekribelonta kaj, kiam venis en novembro 1918 la germana revolucio, ĝi estis preta ĝin defendi. Ĝi konigis tiun volon en giganta kunveno, kiun partoprenis pli ol 20 mil gelaboristoj. Ekde ĉi tiu memorinda kunveno, ĝis la martbataloj en 1921, fakte regadis la laboristaro en la Lojna-fabriko. Kiam en 1920 la monarkistoj estis atakintaj la respublikon, la Lojna-taĉmento batalis sur ĉiuj frontoj de Mezgermanio kontraŭ la monarkista soldataro. Tiam la ĉefaj bataloj furiozis ĉirkaŭ la urbo Halle, precipe fronte al Ammendorf. Ĉi tiu loko ludis gravan rolon en la bataloj dum marto 1921, provokitaj de la registaro por senigi la laboristaron de ĝia potenco, por ke la ĥemiaj reĝoj des pli bone povu ekspluati la gelaboristojn. Tiam la Lojna-fabriko estis kvazaŭ fortikaĵo okupita de la laboristaro. Sed al la regna armeo ekipita per la plej modernaj armiloj, ĝi ne povis daŭre kontraŭstari, kaj ja ĉio jam delonge estis preparita por povi sukcese sufoki la ribelon. "Ju pli sanga la unua tago, des pli bone", estis unu el la eldiroj de la registara prezidanto. Sango fluis torente kaj la kadavroj de murditaj laboristoj amasiĝis, post kiam la policistaro kaj soldataro estis venkintaj. Nun la ĉirkaŭe dislokitaj tomboj de la murditoj atestas pri la heroaj bataloj de la proletaro kaj admonas ne laciĝi en la batalado por ĝia emancipo. Post finiĝo de la bataloj en 1921 la kapitalistoj povis venĝi sin pro la pasintaj jaroj kaj ili faris tion elfunde. Ĉiujn laboristojn oni maldungis, novaj estis dungataj, al kiuj oni diktis kvazaŭ karceran kondiĉaron. Sed malgraŭ ĉiuj penadoj, oni ne povis malhelpi, ke la idearoj pri la emancipo de la proletaro ree enpenetris la vicojn de la Lojna-proletoj.



Tombejo de la mortigitaj revolucibatalintoj en Ammendorf (ap. Halle)

La pejzaĝo. Konkludo

Gek-doj! Per ĉi tiuj linioj vi iomete nur povas ekscii pri nia regiono, kiu sendube estas multflanke interesa. Nur mi ne povas rakonti pri ĉio kaj precipe ne povas rakonti pri la plej interesaj aferoj. Oni devas alveturi kaj rigardi per propraj okuloj; el tio tutcerte ĉiu profitos kaj povos multe plivastigi sian vidsferon.

Ankaŭ pejzaĝe nia regiono ne estas malinteresa. Estas kampoj, herbejoj, riveroj, arbaretoj ktp. Tre proksimaj estas la montaroj Harc kaj turingia arbaro. Interesaj estas la karbminejoj, ili estas enteraj, tamen ne subteraj, ĉar per dragmaŝinoj oni forprenas la tertavolon ĝis la supro de la karbotavolo, kiun ankaŭ per dragiloj oni elfosas. Interesa estas la tuta vivmaniero ĉi-tiea, kun kiu konatiĝi ĉiu havos okazon dum la postkongresa ekskurso al tiu ĉi regiono. Vi povos informiĝi pri ĝia industrio, laborista vivo, laboristaj movadoj, politika kaj kultura, industriaj urboj, kamparaj vilaĝoj kaj agrikulturo, kooperativa movado ktp. Venu, Gek-doj! Venu multaj! Anoncu vin ĉe K-do Otto Scĥiepe, Ammendorf ap. Halle, Talstr. 12. Informu nin pri viaj apartaj deziroj, por ke ni povu organizi la necesajn detal-ekskursojn. Skribu, pri kiom da tagoj vi disponas por la ekskurso. Ni bezonaŝ ankaŭ scii, ĉu vi kapablas publike oratori. Tion ĉi nepre ne forgesu mencii, ĉar ni devas eltrovi, kiel plej utile ni povos interkontaktigi vin kun proletaj elementoj. Interesiĝantoj pri la ekskurso petu pli detalajn informojn pri ĝi. Gek-doj persone kun mi konatiĝintaj povas skribi rekte al mia adreso enhavata en la Jarlibro.

Villi Zimmermann
(SAT-ano 2002), Ammendorf.



EL USONO

Pro anstataŭigo de viroj ĉe fervojo komenciĝas agito por la mallongigo de labortago ĝis 6 horoj kaj de laborsemajno ĝis 5 tagoj. Oficiala statistiko diras, ke en fino de aprilo la senlaboruloj nombras je 1 700 000 da homoj. La fotogravuristoj en Novjorko jam akiris laborsemajnon de 5 tagoj; simile la kolorigistoj, plumbistoj, stukistoj, elektristoj kaj la brikmetistoj. Ĉiuokaze la metiisto ricevas tiom multe da salajro kiom dum la pli longa laborsemajno. Sed oni ne forgesu, ke Novjorko ne estas tuta Usono.

* * *

En la ŝtatoj Karolajna (angle: Carolina) kaj Tenessi (angle: Tennessee) la teksistoj vekiĝas kaj strikoj okazis en Elizabethton kaj aliloke. Antaŭe la industriistoj fanfaronis, ke la striko kaj la fremdlanda agitisto ne ekzistas en sudo de Usono. Nun, timigite de la laboristaj protestoj, la kapitalistoj perforte detruis oficejon de komunista help-asocio kaj forportis du organizistojn. La teksista sindikato, helpata de la Amerika Federacio de Laboro, esperas respondi per organizado de la 300 000 teksistoj en la du ŝtatoj por forigi noktolaboron de virinoj kaj infanoj, limigi la laboron je 48 horoj semajne kaj akiri kolektivan kontrakton por la laboristoj, kiuj antaŭe ne aniĝis al sindikato.

* * *

Satire oni proverbas: "En Usono milionon da dolaroj la juĝisto ne povas kulpigi." Sed unu naftposedanto, kiu antaŭ 4—5 jaroj helpis ŝteli per subaĉeto altvaloran naftteron el ŝtata posedo, kaj kiu poste fanfarone rifuzis doni informon al la tribunalo, nun ricevis pro tiu malrespekto 3 monatojn da mallibero — ridinda kondamno laŭ la kulpo, sed ĝi sufiĉas por konservi la ŝajnon, de superklasa justeco. (488)



Infanlaboro en Ĉinio

Kvankam la moderna industrio en tuta Ĉinio ne tro rapide progresas, tamen jam ekzistas, plejparte en la grandaj havenurboj, precipe fremdaj fabrikoj. Ankaŭ la ĉinaj kapitalistoj bone komprenis elsuĉi la oron el la sango laborista kaj ekscias, ke adaptiĝo al modernaj metodoj pligrandigas iliajn profitojn.

Estas ja fakto, ke per kaj nur post la industriigo povos aperi humaneco kaj la klaskonscio ĉe la laboristaro. Kaj, kvankam oni ankaŭ ĉi tie jam vidas komencojn, ĉi lasta estas treege malforta, kaj la kapitalistoj povaŝ agi laŭplaĉe. Nun ili preferas senlaborigi kiel eble plej multe da laboristoj kaj dungi anstataŭ ili virinojn kaj eĉ infanojn. Plej ofte oni povas konstati tion en la koton- kaj silkmuelejoj kaj tabakfabrikoj de Ŝanĥajo, kie plejparte la nombro da infan-laboristoj jam superas tiun de la plenkreskuloj.

Laŭ statistiko publikigita de Ŝanĥaja magistrata konsilantaro ("Shanghai Municipal Council"), nun laboras en fabrikoj de Ŝanĥajo:

	Knaboj pli ol 13- (ĝis 16-) jaraj	Knabinoj pli ol 13-jaraj ĝis 16-jaraj
Harbin Road . . .	2,675	3,036
Ve Ŝen Road . .	8,321	8,300
Gang zo po Road .	11,189	29,293
Gordon Road . .	17,206	30,473
	?	?
Okcidenta Honkeŭ .	0,389	4,926
Sin Za	0,306	2,292
Honkeŭ	0,150	1,950
Centra	0,450	1,000
Zapie	1,308	15,702
Pooton	2,449	6,269
Sume:	44,425	103,241

N. LENIN:
Ŝtato kaj Revolucio
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27

	Knaboj malpli aĝaj ol 12 j.	Knabinoj malpli aĝaj ol 12 j.
Harbin Road . . .	?	0,082
Ve Ŝen Road . . .	0,443	0,060
Gang zo po Road .	0,543	3,327
Gordon Road . .	1,087	1,934
	?	?
Okcid. Honkeŭ . .	1,454	6,794
Sin Za	?	0,090
Honkeŭ	?	0,200
Centra	?	?
Zapie	?	4,899
Pooton	0,247	0,318
Sume:	3,774	17,704

Tiu statistiko ne estas kompleta, kaj oni povas facile kalkuli, ke estas en tuta Ŝanĥajo pli ol 200 000 infan-laboristoj.

Tiu nombro signifas preskaŭ la kvaronon de la tutaj gelaboristoj en Ŝanĥajo. Ilia ĉiutaga labortempo estas de 12—14 horoj. Ilia laboro estas ne pli malmulta ol tiu de viraj laboristoj, sed ilia salajro ĝenerale egalas nur tri ŝanĥajajn dolarojn (t. e. 1,50 dolaro usona) monate!

El tio ĝis nun dirita oni povas imagi, kiel terura estas la sorto de tiuj infanoj kaj kiel malfacila pro tio la stato de la aliaj gelaboristoj! La senlaboreco fariĝas pli severa pro tio kaj el 103 strikoj en diversaj entreprenoj de Ŝanĥajo dum decembro 1928 okazis 34, t. e. ⅓ pro la emo de la kapitalistoj senlaborigi la laboristojn kaj anstataŭigi ilin kiel eble plej multe per pli malkara infanlaboro.

Ŝanĥajo, 9. 4. 1929.

LA KOOPERADO EN HINDIO

Oni scias maldetale pri la eksterordinara krizo, kiu nuntempe skuas Hindion. En "S-ulo" ni kelkfoje aperigis informojn pri la ekonomia situacio en tiu grandega teritorio, kie la plej diversaj rasoj, religioj, lingvoj, civilizoj miksiĝas, interpuŝiĝas, kiu estas regita laŭvice de la grekoj, mongoloj, eŭropaj popoloj kaj nun de britoj. Neeviteble ĝi eniras la kadrojn de l' moderna ekonomia vivo. Sed la industria revolucio, kiun ĝi travivas hodiaŭ, kaŭzas terurajn reefikojn en landego precipe kampara, kies terkulturo neniam savis ĝin kontraŭ malsatoj kaj nesufiĉa nutrado. De tie venas ĉiuspecaj fizikaj kaj moralaj suferoj; de tie ankaŭ naskiĝas helpo, esperoj.

Gandhi rekomendas al la hindoj revenon al la primitiva civilizo, simpla kaj sana, al radŝpinilo, kiel li diras, simboligante la tutan sistemon: la hindoj rezignu aĉeti anglajn ŝtofojn, dediĉu du horojn ĉiutage por teksi siajn bezonatajn kotonaĵojn kaj solvu tiel la problemon pri pano kaj libero. Li trakuras la tutan duoninsulon anoncante la evangelion de l' ribelo sen perforto, kiam sole la ŝtiparoj el anglaj ŝtofoj montros la forton de profunda sentado, — kio tamen maltrankviligos la britojn. Sed ĉu oni iam revenos malantaŭen? Ĉu estas eble rekonduki Hindion al tio, kion Gandhi kaj liaj samkreduloj nomas la ora epoko?

Hindio hodiaŭ estas industria lando, kalkulata inter la teks- kaj metalindustriaj potencoj. La industria revolucio estis abrupte trudata de ekstere al malbone preparita socio, kaj la eŭropaj malbonoj de tiu ĉi epoko de industriigo ekfuriozis en Hindio. Sed samtempe oni interesiĝis pri la metodoj, per kiuj en Eŭropo limiĝis la domaĝoj. Laborista leĝaro, sindikata organizado, kooperado fine, jen la modernaj rimedoj por batali kontraŭ la malbonoj, kiuj atakis Hindion.

De nun la terkultura kooperado estas fakto konsiderinda en Hindio: 75 000 unuiĝoj grupigas pli ol 1 800 000 kamparanojn. La brita leĝaro permesas al ĉiu grupo el dek personoj vivantaj en sama vilaĝo formi societon, kiu ricevas la membro-deponojn, pruntedonas al la anoj bruton ŝanĝe ktp. Tuta reto da kooperativoj sin vivtenas en la vilaĝoj kaj en la provincoj; dank' al ili, la laborema hindo evitas la jugon de l' kreditoro, kulturas sian teron en pli bonaj kondiĉoj, kunlaboras je ĝenerala pli bona stato de l' lando.

La kooperistoj ankaŭ estas pontkonstruantoj: inter la malnova hinda socio, tiel primitiva en sia vilaĝa kadro kaj kasta dispartiĝo, kaj la estonta socio, kunligonta en forta sintezo ĉiujn homajn grupiĝojn, la Kooperado faras sian kuraĝan arkaĵon. Ĝis nun la aliĝantoj ja nur estas mizeraj analfabetoj, kiuj malbone komprenas la funkciadon de l' kooperativoj, sed iom post iom eksentiĝos rimarkeble la avantaĝoj de l' kooperado al ili, kaj la novaj institucioj fariĝos pli kaj pli ŝatataj.

El "Le Cooperateur" kompiltradukis B. L.



Oni plenumas manifeston de "10 Jaroj de Oktobro"

Dum dekjara datreveno de Oktobra Revolucio per manifesto estis anoncata laŭgrada transiro de niaj entreprenoj al sephora labortago. La registaro decidis dum la nuna jaro enkonduki la mallongigitan labortagon en 308 industriaj entreprenoj, en kiuj laboras 290 mil laboristoj. Dum la pasinta jaro jam estis enkondukita mallongigita labortago en 28 entreprenoj kun suma kvanto da 127 mil laboristoj.

Kion signifas la mallongigita labortago por la popola mastrumo? Pri tio oni juĝas laŭ sperto de entreprenoj, kiuj aplikis la mallongigitan labortagon dum pasinta jaro. Ĉe 20 teksaj fabrikoj (kie jam estas aplikata 7-hora labortago) oni povis entiri al produktado 20 mil novajn laboristojn, kio signifas preskaŭ 20% da ĉiuj laboristoj en la industrio. — Tio malmultigis senlaborecon inter la teksistoj. Pliboniĝis eluzo de fabrika instalaĵo. Antaŭe la stabloj kaj maŝinoj de l' fabrikoj funkciis 92 horojn semajne, kaj nun ili troviĝas en funkcio 123 horojn semajne.

Ĉio tio kondukis al pligrandiĝo de l' produktokvanto en la entreprenoj.

Elrusigis el "Gudok" (23. 4. 29)
Florov (SAT-ano 7198).

EL MEKSIKIO

Baraktante en la imperialista antagonismo de nia epoko inter ŝia potenca najbaro, Usono, kiu avide deziras ĝin konkiri kun ĝiaj nafto-fontoj, kaj la envia protektemo de Britio kaj ĝiaj kontraŭusonaj kunfederacianoj, Meksikio estas gvidata de antaŭenema, reformema registaro. Ĝia historio estas tiu de malsukcesinta koloniigo. La posteuloj de l' hispanaj konkirintoj zorgis nur rapide riĉigi sin. La leĝaro ellaborita en Hispanio por la indiĝenoj, fakte ne estis aplikata en la lando. La indiĝenaj kondiĉoj egalis al sklaveco. Kreoloj kaj mestizoj estis senrangigitaj. Prebendojn ricevis nur la favoratoj de l' Madrida kortego.

Logika sekvo de tiu stato estis politika batalado por nacia sendependeco, kiu komenciĝis kun la 19-a jarcento. Kreoloj kaj mestizoj unuigitaj, apogantaj sin je la indianoj, forpelis la estrarojn reprezentantajn la reĝon de Hispanio. Sed la vivkondiĉoj pro tio ne ŝanĝiĝis. La hispana kolonia reĝimo postvivis dum la tuta deknaŭa jarcento.

La hispana koloniigo en Meksikio distingiĝis per du karakterizaj faktoj: formado de *latifundia*[1] kaj politika kaj ekonomia superregado de l' Eklezio. Ankaŭ la enveno Meksikion de fremdaj kapitaloj, kiuj komencis la industriigon, ne multe ŝanĝis la sociajn vivkondiĉojn. En la politikaj bataloj de l' lasta jarcento temis nur pri konservado aŭ radikala transformado de l' hispana kolonia reĝimo, kies profitegantoj estis la grandbienuloj kaj la Eklezio. Dum la prezidanteco de generalo Diaz malakriĝis la tumultoj; kiam la diktatoro maljuniĝis, ili revigliĝis. En 1910 kaj precipe en 1913 Meksikio rompis la tricentjaran tradicion. La meksikia popolo, malsata je tero kaj libero, kondukis Maderon al potenco; sed Madero, idealisto, ne havis sufiĉan forton por solvi la malfacilan taskon, kaj generalo Huerta sukcesis lin renversi kaj forigi.


La diktatoreco de Huerta reekscitis la revolucian movadon kaj portis al regado la generalon Karanza. Nacia kunveno fermis la kolonian ciklon, ĝi redaktis la Konstitucion de 1917, kiu enhavas bazojn por terreformo, rekomenco de batalo kontraŭ la Eklezio kaj ŝtatigo de l' subgrundo, kio devis elvoki grandajn malfacilojn kun Usono. La revolucio komencita en 1910 akiris nur sep jarojn pli malfrue juran starbazon.

La terreformo estis speciale malfacila. La tero estis malbone kulturata kaj la kamparano (indiano) estis tenita en stato de nescio, kiu lin malkapabligis tiri rapide profiton el la riĉo, kiam li ekhavis laŭleĝan rajton. Dume, dekomence, oni konsentis al la elproprigitoj la principon de kompenso, sed la revolucia registaro ne havis monon kaj tial praktike nur povis fari promesojn sub formo de pagbiletoj, kies rentumiĝo kaj amortizo malfacile plenumiĝas.

Post kelkaj provaj, leĝdonaj reformoj, oni venis al koncepto pri komuna propraĵo, dividita en individuajn nevendeblajn propraĵojn, konsistiganta heredan

[1] Latina vorto, kiu signifas: grandbienoj.

posedon familian kaj kooperative valorigata. Oni direktis sin tre klare al la kooperada reĝimo. Tiel ekzemple dum tri jaroj, sub la kontrolo de agronoma inĝeniero, terkulturaj kooperativoj, subtenataj de konsum-kooperativoj kaj agrikulturaj kreditbankoj, atingis staton de prospero, kiu montriĝas en la transformiĝo de l' vilaĝoj: konstruado de magistrataj domoj, anstataŭigo de indiĝenaj kabanoj per domoj, akvumaj laboroj, vojkonstruado, sanigado. Tamen tie, kie la indiano ankoraŭ ne estas instruita, la rezultoj estas malpli kontentigaj. Sed kie li estas gvidata, li montras sin kapabla profitigi la ĝeneralan ekonomion de l' lando per la kapabloj, kiujn oni donis al li. Estos de nun malfacile pravigi la sklavecon per aserto pri denaska malkapablo de l' indiano.



Volontuloj (laboristoj, kamparanoj) por subpremi la klerikalan-grandbienulan ribelon

La lasta intercivitana milito evidentigis, ke la laboristaro kaj subpremataj tavoloj donis al la registaro sian subtenon aktivan por kontraŭbatali Eklezion kaj generalojn. Ĉar ili ekkonis en la ribeluloj siajn antaŭajn sklavigintojn, kiuj senhonte riĉigis sin sur la dorso de l' popolo. Sed subtenante tiel la nunan registaron, ili postulos siaflanke de ĉi lasta pozitivan porlaboristan politikon: ne nur la neniigon de tiuj reakciaj ribeluloj, sed fakte liberigon el ekonomiaj kondiĉoj, kiuj estas diktataj de la kapitalisma sociordo. Ili batalos por la postuloj de l' tutmonda Proletaro.

Elto.

Justeco en Francio

Okaze de agitado de Internacia Ruĝa Helpo tra Francio oni ekscias pri la historio de Rusenk. Kiu estas Rusenk? Estas kamparano, kiu naskiĝis en Sankta Ĵil (fr.: St. Gilles) en departemento Gar (fr.: Gard). 18-jara Rusenk forlasis sian vilaĝon por labori en aliaj landoj. Ĉar li ne estis riĉa, oni arestis lin dumvoje kiel vagulon kaj kondamnis lin je puno de 15 tagoj da mallibero. Sed Rusenk havis ribeleman spiriton, li ekkaptis pecon da pano kaj ĵetis ĝin en la vizaĝon de l' juĝisto. Pro tiu gesto li estis kondamnata je unu jaro kaj unu tago da mallibero. En Francio tiaj kondamnitoj devas fari sian militservon en "disciplin-regimentoj". Kiam li estis 20-jara, Rusenk foriris Alĝerion por militservi. Tie li devis toleri plej malbonan traktadon fare de oficiraĉoj. Tial Rusenk, en fino de la militservo, por esprimi sian malestimon al oficiroj kaj registaro, forbruligis siajn militvestojn en valoro de 50 frankoj. Pro tiu ago la militribunalo kondamnis lin je 20 j a r o j da punlaboro.

Kiam la nuna prezidanto de l' franca respubliko, Gaston Dumerg' (fr.: Doumergue), vizitis Nim (fr.: Nîmes), la maljuna patrino de Rusenk iris el sia vilaĝo por sin ĵeti al piedoj de l' prezidanto kaj peti pardonon por sia filo. Li promesis ĝin, sed ne plenumis. La patrino nun turnis sin al la "Ligo por Homaj Rajtoj". Sed denove estis elreviĝo, ĉar la Ligo respondis al ŝi, ke ĝi perdis la dokumentojn pri Rusenk. Fine ŝi transdonis la aferon al Ruĝa Helpo, kies agado estis tiel efika, ke polica gazeto devis okupi sin pri la afero kaj fari referendumon. Ankoraŭ Rusenk ne estas libera, sed la laboristaro, atentigita pri tiu kazo de "justeco", nun ne ripozos, ĝis ĝi sukcesos elŝiri Rusenk-on el la punlaborejo.

C r o u z e a u (Nîmes).

El Italio, la paradizo de l' faŝismo

Se ni volus kredi al la opinio de Nitti, la iama prezidanto de l' italia Konsilantaro, la faŝismo estas tre proksima al sia fino. Li opinias, ke estas la mizero de l' loĝantaro, la ekonomia fiasko, kiu faligos post nelonge la faŝisman reĝimon. Kaj li citas jenon:

"La t. n. plebiscito (popola voĉdonado) estis farso. Kiel oni scias, la publikigitaj rezultoj estis jenaj: 8 650 740 personoj voĉdonis el 9 650 750 enregistritoj, t. e. 89,63 elcentoj da enregistritoj; 8 506 576 voĉdonis j e s (por la reĝimo) kaj 136 198 n e (kontraŭ). Fakte, la nombro da voĉdonantoj estis malmulte grava, kaj la nombroj estas troigitaj. La voĉdono estis preskaŭ ĉie publika kaj la kuraĝuloj, kiuj riskis voĉdoni k o n t r a ŭ, elmetis sin al gravaj danĝeroj. En mia naskiĝa urbo, en Bazilikate, kie ĉiuj estas por mi, escepte la profesiaj faŝistoj, oni publikigis kiel rezulton: 97 586 j e s kaj 10 n e! En Fiume, kie la loĝantoj en sia plimulto malamegas la faŝismon kaj kulpigas ĝin esti kondukinta ilin al mizero, estis 16 361 j e s-voĉdonantoj el 16 845! T i u c i f e r o e s t a s s u p e r a a l l a i t a l a l o ĝ a n t a r o v i r s e k s a d e l a u r b o!

"En la aneksita provinco de Tirolio, en Supra Adigo, kie la loĝantaro estas preskaŭ tute germana, oni indikis 38 243 j e s kaj 2809 n e. En kelkaj kamparaj regionoj oni eĉ trovis nenian k o n t r a ŭ a n voĉon; ekzemple en Matera, kie estas ĉiuj miaj elektintoj, la ŝtatoficistoj, fervojistoj kaj laboristoj estas devigitaj voĉdoni. La faŝistoj minacis: T i u, k i u n e v o ĉ d o n a s, e s t a s t r a n s k u r i n t o, t i u k i u v o ĉ d o n a s k o n t r a ŭ, e s t a s p e r f i d u l o.

"Ekzistis du balotiloj kun la noto j e s kaj n e. En kvar kvinonoj de l' komunumoj oni devigis la elektantojn redoni en la faŝista sidejo la n e balotilon, por havi la pruvon, ke ili voĉdonis j e s. Tamen la nombro da n e voĉdonintoj estas tre konsiderinda; nur ĉe la finkalkulo oni trovis pli oportune konsideri ĉiujn voĉojn kiel favorajn!...

"Kio rilatas la financan situacion, oni nur bezonas montri, ke en 1928 la enportoj sumiĝis je 22 047 milionoj da liroj, la elportoj atingis 14 527 milionojn: tio signifas deficiton da 7514 milionoj! Transformante en or-lirojn tiujn sumojn, oni konstatas, ke la fiasko estas ankoraŭ pli granda. La komerca bilanca deficito estis en 1924, iom post estriĝo de l' faŝismo, ĉ. 643 or-milionoj; ĝi kreskis ĝis 939 en 1926, ĝis 1254 milionoj en 1927, kaj fine ĝis 2047 ormilionoj en 1928.

"Oni vivis ĝis nun per la pruntepreno de 450 milionoj da dolaroj el Usono, donante kiel garantion la plej bonajn industriojn en Italio. En neniu lando oni trovas tiom da komercaj bankrotoj kaj nepagataj kambioj. La senlaborula nombro estis en lasta decembro oficiale 390 279; fakte la nombro varias inter 800 000 kaj unu miliono. Ĉiuj urbmagistratoj elspezis multe pli ol ili enspezis. Oni salajras krom ordinara policaro kaj ĝendarmaro enurban policon el 14 000 spionoj. Krome ekzistas ses specialaj milicioj por spionado ĉe fervojoj, ŝoseoj, havenoj ktp.

La kontrakto kun la Vatikano estas nur trompa blufa venko eldevigita de Musolini. Fakte la papo atingis ĉion, kion li celis.

"En kia situacio vere troviĝas la faŝisma Italio, karakterizis antaŭ nelonge granda financa organo de Novjorko, kiu diris, ke la manipulado de l' italiaj borsoj estas la antaŭ-kura signo de l' nepra ekonomia ruiniĝo."

Laŭ intervjuo farita al la gazeto "PAX" (Parizo).

★

RUĜA URBETO EN BLANKTERORA LANDO

En la "demokrata" Rumanio — pri kiu lando tre malofte aŭdas ion la SAT-anaro — okazis en urbeto Vulkan la 4-an de aprilo balotoj por la nova komunuma konsilantaro (urbestraro), ĉe kiu la laboristoj venkis kun granda sukceso super la burĝoj.

Malnova afero estas, ke en la r u m a n l a n d a j soc. dem. organizoj kaj en la partio kontraŭrevoluciaj tendencoj gvidas, sekve la revoluciemaj laboristoj daŭre estis forigataj, ofte per estrara helpo, el la organizoj kaj partio. Ĉi tiuj revoluciemaj kaj persekutitaj laboristoj unuiĝis en alia nova organizo, fondante la tielnomatan "Unueca Fakorganizo"-n. Ĉi lasta estis nomata de soc. demokratoj — ironie — "bolŝevikoj" kaj laŭ estrara diro "komunistoj". Ĉi tiuj nomoj ankoraŭ ne estas kutimaj eĉ inter laboristoj, kiuj ektremas aŭdante tian "blasfemon". (En Rumanio la vorto "bolŝevik" signifas rumane, germane aŭ hungare: monstro, kanibalo). Malgraŭ tiuj supraj pseŭdonimoj la laboristoj

amase organiziĝis ĉe la unuecaj organizoj, precipe la senlaboruloj, ĉar ili estis tute forlasataj de aliaj organizoj.

Tia unueca organizo fondiĝis en la Ĵilvala urbeto Vulkan, kie la unueco estas tiel rimarkinda, ke ĝi povus esti ekzemplo al ĉiuj laboristaj centroj en blankteroraj landoj. La rezulto de la balotoj estas jena: Unuecaj 930, Nacia partio kun la loka soc. dem. alianco 638, Liberaluloj (labordonantoj) 240. La lokaj gazetaĉoj (rumana, hungara) funebre komunikis la malvenkon de burĝoj, kio, laŭ ilia opinio, restos eterna honto ankaŭ en la venonto por ĉiu urbano de Vulkan. La departementa estraro petis la ministron por internaj aferoj nuligi ĉi tiun baloton, argumentante, ke laboristoj neleĝe aplikis t e r o r o n kontraŭ la estraroj.

Tiu supra rimarko iomete estas vera, ĉar la laboristaro ĝis la fino de balotado, tutan tagon, ne forlasis la urnon; vane petis ruze la parlamenta deputito la laboristojn, ke ili hejmeniru "por tagmanĝi". La laboristoj gardis kaj kontraŭstaris eĉ la ĝendarman atakon. Nur tiel ne okazis la kutima urnoŝtelado kaj ŝanĝo. Post kelkaj tagoj io alia okazis. Alvenis ministra dekreto, kiu nuligis la Vulkanan baloton kaj fermis la unuecorganizojn tutlande. Sekve la estroj de tiuj organizoj ĉie estis enkarcerigataj, laboristoj, enskribitaj ĉe unuecaj organizoj, batataj de l' ĝendarmoj kaj policistoj.

Socialdemokratoj en la parlamento deklaris, ke la fermado de unuecfrontaj organizoj estas neleĝa. Vane.

J i l v a l a n o (13 821).



sen grandaj literoj

oni multe parolas pri neniigo de grandaj literoj en la alfabetoj de ĉiuj popoloj. eŭropa scienco ankaŭ okupas sin pri ĉi tiu demando. oni scias, ke germana popolo pli ol iu aplikas tiujn grandajn literojn. la statistiko donas jenajn ciferojn pri la aplikado de grandaj literoj: en germana lingvo — 5%; en rusa kaj aliaj 0,5% de ĉiuj literoj uzataj.

kial do oni proponas neniigi grandajn literojn? tial ke tiu reformo helpos al celoj de teknika ekonomiigo, teknika raciigo de poligrafa industrio kaj same multe helpos al infanoj lerni sian lingvon. estas notinda fakto, ke ĉi tiun reformon iniciatas germanaj instruistoj kaj poligrafoj!

kiun raciigon donos ĉi tiu reformo? unue — devas esti plifaciligataj, plimalgrandigataj kaj sekve plimalkarigataj skribmaŝinoj. oni ne bezonos "duetaĝan" alfabeton kaj specialajn levilojn; ja tio nur pligrandigas la koston de l' maŝinoj. ili estos pli malgrandaj, je 40—50% pli malmultekostaj, sekve pli uzeblaj. pli da homoj ilin uzos. skribmaŝinistinoj ne elspezos vane tempon por levi levilon kaj skribi nur unu grandan literon. 4% de sia muskolforto maŝinistino elspezas nur por levi supran levilon! sekve pli ol 20 minutojn ĉiutage (ĉe 7-hora labortago) elspezas maŝinistino por grandaj literoj. sed ankaŭ tiuj literoj devigas ŝin streĉi atenton. ŝi ja povas anstataŭ tio skribi 3—4 paĝojn pli. tiuj 3—4 paĝoj de maŝinistino estos grandegaj, se vi kunprenos ĉiujn maŝinistinojn laborantajn en oficejoj, redakcioj, kontoroj ktp. de l' tuta mondo! sed pli gravan ŝparon ĉi tiu reformo donas al presejo kaj kompostejoj. la kompostkesto fariĝos pli malgranda, linotipoj ankaŭ. simila reformo faros revolucion en presindustrio!

ĉu ekzistas kontraŭdiroj? certe! kelkaj timas, ke la skribita kaj presita teksto ne estos estetika por la okuloj! estetiko ja estas laboro de belskribistoj! orientaj popoloj akceptante latinan alfabeton uzas ĝin sen grandaj literoj, en uzbekista k. a. respublikoj orientaj depost jaro 1926 oni uzas jam nov-reformitan alfabeton sen grandaj literoj. eŭropo sekve nun nur sekvos orienton! mi mem jam 7 jarojn korespondas kun lingvisto, kiu ne aplikas grandajn literojn; mi vidis uzbekajn librojn, gazetojn — kaj mi devas konfesi, ke malfacila estas nur la komenco. sed revolucia vojo ne devas timi — komenci efektivigon de ĉi tiu reformo. D m. S n e ĵ k o, Minsk.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

15. Buonaroti

Buonaroti estis unu el la plej eminentaj disĉiploj de Babef (fr. Baboeuf) (vidu "S-ulo" n-o 206). Li naskiĝis en Firenze (Italio) la 11. novembro 1761. Ekzilite de la grand-duko de Toskano pro siaj jakobenaj opinioj, li iris al Korsiko. La Franca Revolucio trovis en li pasian defendanton, agitiston grandformatan, kaj la ligoj, kiujn li konservis kun sia denaska patrio, permesis al li organizi en Firenze ribelajn movojn. La konvencio venigis lin al Parizo, kaj oni scias, ke dekreto de 27. majo 1793 konsentis al ili la francan ŝtatanecon.


Buonaroti (1761—1837

Tiam li partoprenis je la teroro, la Konspiro de l' Egaluloj (vidu en n-o 206), kiu fiaskis. Li estis kondamnata, enkarcerigata kaj deportata. Poste komenciĝis por li la vagant-vivo de l' ekzilitoj. Li rifuĝis al Svisio, kie li restis ĝis 1823, poste li vivis en Belgio ĝis 1830.

Dum la tuta periodo, kiun li vivis en Bruselo, li rilatis konstante kun la progresemaj rondoj, kaj lia influo portiĝis sur tutan vicon da eminentaj homoj, kiuj estis ludontaj depost la revolucio de 1830 kaj en la politika vivo de Belgio unuarangan rolon: Ĵotran (fr.: Jottrand), membro de l' Nacia Kunveno, kaj Delhas (fr.: Delhasse), liberalaj demokratoj, kiuj kunlaboris kun Karl Marks fondante la Demokratan Asocion de Bruselo en novembro 1847.

Por montri Buonaroti-n en lia agado kaj lia temperamento, ni reproduktas la tekston de letero, ĵus retrovita en Belgio, kiun li sendis en jaro 1792, la jaro I de l' franca respubliko, al la Konvencio en Parizo:

"Civitanoj, Reprezentantoj de l' Popolo! Mi veturas al Sardinio: la glavon en unu mano, la deklaron de l'rajtoj en la alia. Mi batos teren la grandulojn, mi klerigos la pantalonulojn[1]. Toskano donis al mi la vivon: Francio estas mia patrio; mia vivo estas senĉesa batalo por la libereco. La deputitoj de Korsiko scias, kiu mi estas. Mi petas la Ĉielon pri la elokventeco de l' vero; mi petas la Konvencion Nacian pri subteno kaj protekto al edzino kaj amataj infanoj en la okazo, se mia vivo estos necesa por la triumfo de l' universala libereco. Eŭropo estu libera; kaj mi mortas kontente.

"(Subskr.) Buonaroti, nuntempe Nacia Komisaro de l' Korsika Distrikto. Sendita Sardinion, kiel apostolo por la libereco, de la Societo de Popolamikoj en Korsiko."

[1] Fr.: Sans-culottes.

DISKUTEJO

La seksa demando kaj sennaciuloj

La artikolo de K-do Paped (11 871) en n-o 238 devigas min, diri ankaŭ mian opinion pri tiu problemo. Ni kiel SAT-anoj nepre estu liberecemaj, do homoj batalantaj por ĉ i a libero. Ni ne toleru subpremadon, ekspluatadon ĉiuspecan, sed ni ankaŭ ne estu subprememaj kontraŭ aliaj homoj. El la artikolo de nia K-do mi ĉerpas, ke li verŝajne havas bonan laboremon por nia movado kaj montras sin batalema kontraŭ subpremado; sed en la rilato al seksa demando, li mem prezentas sin subpremema, nome kontraŭ niaj Gek-doj serĉantaj en alilando kunulinon aŭ kunulon.

Li ekz. skribas i. a. jenan frazon: "Estas tempo por fini ĉi tiun internacian amindumadon, senutilan al komuna vivo de proletaro, estas tempo por el estontaj homoj eduki, organizi kaj formi novajn homojn — homojn komunaktivajn kaj necesajn al laborista kaj esperanta movado." Tiu frazo montras, ke la K-do volas malpermesi al niaj Gek-doj la internacian amindumadon. Kial do, ĉu tio povas malutili al nia movado? Ne, tute ne, mi devas respondi. Proleto, kvankam tre revoluciema, ne povas subpremi la instinkton "amo". Oni povas esti amindumema kaj tamen oni povas esti aktiva batalanto por la bono de la proletaro. Estas ja tute egale, ĉu la unuopaj Gek-doj amindumas kun geeksterlandanoj aŭ kun gesamlandanoj, la ĉefaĵo estas, ke ili samtempe ankaŭ restu revoluciuloj. Oni devus rekomendi edziĝojn kun nesamlandanoj.

S A T - a n o 6707.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 5 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 5

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

Liberpensa propagando en Francio

Kara K-do aŭ K-dino! Haltu momenton kaj auskultu nin. Ni volas doni al vi okazon mediti pri religiaj aferoj kaj konigi al vi niajn ideojn pri tio. Pro kio ni ne estas kristanoj?

Ĉar ekzistado de Dio, jesata de iuj filozofo, neata de iuj aliaj ankaŭ eminentaj, ŝajnas al ni ne evidenta, precipe kiam ni konsideras mizeron kaj maljuston, kiuj regas tra la mondo. Despli prave, ni ne povas kredi, ke dio estas en tri personoj.

Ĉar ni ne povas scii, ĉu la "kristana aperaĵo" estas pli bona ol tiuj aliaj religioj, ĉar pastroj de ĉiuj religioj donus al ni provojn pri aŭtentikeco de sia propra religio, la mazdanoj el Bombe kaj ankaŭ budanoj el Cejlono.

Ĉar la Palestina popolo, kiu vidis supozitajn miraklojn de Kristo, ne akceptis lian religion.

Ĉar, se "sanktaj libroj" estus inspirataj de dio, ili estus skribataj en lingvo tiel klara, ke ili estus komprenataj de ĉiuj laŭ sama maniero. Nu, nenia libro estas interpretata sendube, laŭ tiel malsamaj manieroj. Ekzemple: la teksto, pri sankta manĝo estas komprenata malsame de katolikoj, de luteranoj, de kalvinanoj. Legu Biblion: vi trovos en ĝi neverŝajnajn rakontojn, kiel tiujn pri "Jonas" aŭ pri azena makzelo. Vi trovos eĉ en tiu libro malĉastaĵojn. Libroj inspirataj de dio devus esti treege puraj.

Ĉar la katolikaj dogmoj ne estas ĉiuj kreitaj de Kristo; estas nur en 787-a jaro, ke ĉeesto de dio en hostio estis akceptita; papa neeraremo depost j. 1870 ktp. Puriĝejo (purgatorio) estis kreita nur multajn jarcentojn post Kristo, konfesprenado komenciĝis nur en Okcidento dum 7-a jarcento.

Ĉar, se estonta vivo ekzistas, ĉiu estos punota aŭ rekompencota laŭ siaj meritoj, kaj ne laŭ siaj kredaĵoj aŭ la preĝoj aŭ mesoj faritaj por mono, favore al ĝi.

Ĉar dio donis al ni saĝon por uzi ĝin kaj ne por devigi nin kredi misterojn; ekzemple, kredi post sanktigo, ke hostio ne estas pano, sed korpo de dio.

Ĉar, eĉ se dio ekzistas, li ne povas peti, ke ni senĉese trudu lin per preĝoj. Li scias tion, kion ni deziras kaj ni meritas. Se estas necese peti kaj petegi reĝon, lian edzinon aŭ liajn flatulojn por ricevi ion de li, ne estas same pri dio, kiu estas ĉiopova kaj justeco mem. Li ne povas eĉ esti malkontenta, ĉar ni ne kredas al lia ekzistado. Se ni provas atingi nian perfektan idealon, ni povas nin prezenti antaŭ li sentime, certaj ne esti brulontaj en eterna fajro. Pro senfina boneco kaj senfina toleremo, li riproĉos nenion al ni, tial ke ni obeis ĉiam saĝon. Vi povas esti trankvila pri tio.

Ni aldonu ankoraŭ du argumentojn:

1. Depost unuaj apostoloj, kiuj rifuzis militi kaj depost "dia interpaco" la Eklezio nenion faris por malebligi militojn. Kontraŭe, en ĉiuj landoj el la mondo katolikoj estas la plej militemaj. Estis imperiestro Francisko-Jozefo, la plej bigota el homoj, kiu proklamis la lastan militon. Se en Francio kaj en Germanio katolikoj batalus kontraŭ milito kiel socialistoj, ni ne bedaŭregus morton de tiel multaj el niaj parencoj kaj amikoj, detruon de tiel multaj hejmoj kaj ruinon de Eŭropo.

2. La Eklezio, kiu estis, en malnovaj tempoj, partio por malriĉuloj, estas nune amiko por riĉuloj. Ĝi konsilas al laboristoj subiĝi al siaj mastroj por permesi al tiuj lastaj vivi en lukso kaj plezuroj, dum la laboristoj duoble laboras por nepriĝi al riĉuloj potencon super ĉiuj laboristaj ebloj.

Revoluciuloj komence, la katolikoj estas nune reakciuloj, kiuj estas kontraŭ la leĝoj favoraj al laboristoj, en parlamentoj, kaj ne volas konfiski riĉojn faritajn dum la milito, kiam popolo verŝis sian sangon sur batalaj kampoj.

K-do aŭ K-dino, se vi opinias, ke ni estas pravaj, kuraĝu praktiki nenian religion kaj eduki nereligie viajn infanojn. Estu sincera: certe tio estas la plej grava bono, kiun vi povas havi.

Liberpensuloj el la Mure Isère (Francio).
Traduko de SAT-anino 5883.

NE FORGESU!

La ateista kongreso tutsovetia okazos 10-an de junio en Moskvo; la dato estas finakceptita. Ĉiu liberpensula organizo devas per vi, esp-istoj, sendi salutleterojn, verkitajn en esp-o laŭ la adreso: Moskvo, Sretenka, 10 "Bezboĵnik".

Ĉiu agema liberpensulo aŭ SAT-ano devas helpi organizadon de l' dumkongresa ekspozicio. Sendu religiajn gazetojn, broŝurojn flugfoliojn kaj aliajn eldonaĵojn en esp-o, por ke ni bone povu montri, kiel nia kontraŭulo sukcese uzas por siaj celoj esp-on.

Ankaŭ ne forgesu ke la sukceso de esp-o en la kongreso dependas de tio, ĉu vi aktivuloj-liberpensuloj sufiĉe da materialo sendas el diversaj landoj por la gazeto "Bezboĵnik". Ĉion sendu laŭ supre citita adreso.

DU METODOJ DE AGITADO

Por tenadi la malklerajn homojn en la potenco de l' religio, la diservantoj aplikas la metodojn de timigo per postmortaj turmentoj. Laŭ iliaj vortoj ĉiam, tage kaj nokte, la animon de l' homo ĉasas la diablo. Tiu lasta, interalie ankaŭ dia kreitaĵo, havas tre malkvietan taskon: delogi de la vera vojo ĉiujn religiemajn homojn. La malkredulojn tio ne koncernas, ĉar ili post sia morto, kiel diras la popoj (pastroj), ĉiuj estos je la dispono de l' diablo. Pri la batalo inter diablo kaj dia anĝelo pro la homa animo oni ne nur predikas parole, sed surmurigas en preĝejoj bildojn pri tiu temo. Tio okazas ne nur en vilaĝoj, kie la malklera loĝantaro ankoraŭ kredas al pastraj fabeloj, sed ankaŭ en urboj, kie precipe en laboristaj regionoj, la religio jam perdas sian potencon.

En nia urbo Ivanovo-Voznesensk, en urba katedralo, oni povas vidi similan bildon ĉe la enirejo de la somera preĝejo. La bildo prezentas: malsupre malfermitan buŝegon de iu monstra besto plenigitan per infera fajro. En la profundo de l' buŝego sidas sur trono maljuna ĉefdiablo kun forkego, signo de lia potenco, en la mano. Apud la fajra buŝego staras malvasta ŝtuparo kuniganta la inferon kun la ĉielo, kaj supre, super la ŝtuparo, sidas sur la nubetoj dio mem kun siaj sanktuloj. Maltrankvile admiras li la batalon, okazantan sur la ŝtuparo: nigra diablo penas (kaj ne sensukcese) forpuŝi de la ŝtuparo la supreniĝantajn penajn animojn, blanka anĝelo, siaflanke, penadas per ĉiuj siaj fortoj treni la animojn ĝis la dio. Sur vizaĝo de l' anĝelo — kortuŝanta mildeco. La diablo, male, aspektas plej terure. Jen estas la maniero, per kiu la pastroj akcelas la plifortikigon de religiaj katenoj. Kaj jen estas alia maniero de agitado, — agitado kontraŭ la religio kaj malsaĝaj fabeloj de ĝiaj adeptoj.

Antaŭ 2 monatoj, en vilaĝo Ĥarilovo, de Tejkova distrikto mortis 72-jaraĝa vilaĝano Vasilij Timofejeviĉ Peĉnikov, kiu estis de ĉiuj estimata pro sia sobra, justa vivo. Sian tutan liberan tempon li dediĉis al frukt- kaj abelkulturado. Kreskigante en sia ĝardeno novajn perfektigitajn specojn de pomarboj, li provizadis per ili la kamparanojn en la tuta regiono. Tiele li enportadis kulturon en kamparvivon, li utilis al la socio.

Nur pro unu sia kvalito li malplaĉis al religiaj fanatikuloj: li estis liberpensulo. Per sia racio li komprenis, ke religio estas opio kaj la diservantoj parazitoj. Antaŭ sia morto li testamentis al sia filo, ke oni lin enterigu sen pastroj. Tio estis farata. Anstataŭ pastra kantaĉo, infanoj-lernantoj kantis per harmoniaj voĉoj la funebran marŝon. En sia parolo la instruisto klarigis, ke religio kontraŭas la sciencon. Post li parolis reprezentanto de kompartia organizo, kiu montris, ke la tempo, uzita de l' mortinto por kultura afero, jam donis siajn deziritajn rezultojn. Post la paroladoj la vilaĝa junularo portis la ĉerkon tra la tuta vilaĝo. Tiel la novaj homoj agitas kontraŭ la religio, kaj tiu metodo de l' agitado estas ĝusta kaj konvinka.

Griŝeĉkin, direktoro de teks.-fabriko N. I. V. M. (Ivanovo-Voznesensk).

TRA ESPERANTIO

INTER NI

— *Ĉu homoj havas animon?*

— *Vi maltrafe starigas la demandon. Diru: ĉu ĉ i u j homoj havas animon?*

— *Ne ŝercu! la demando estas grava . . .*

— *Mi parolas tute serioze k konsentas kun vi, ke la temo malpostulas ŝercon. Necesas unue interkonsenti pri la difino de l' termino. Kion vi komprenas per la vorto animo?*

— *Mi komprenas ion nematerian, kio ekzistas en si, sendepende de la korpo, al kiu ĝi donas vivon; mi komprenas ion, kio estas senmorta.*

— *Ha! ha! Estas vi la ŝerculo. Neniam fizikisto povis konstati la ekziston de io nemateria. Vi tute fantazias. Se mi konsentus kun via difino, mi nepre aldirus, ke ĉiuj homoj estas senanimaj.*

Laŭ mi, animo estas ia stato de delikate sentanta, alte pensanta homo, stato, kiu r e z u l t a s el materiaj movoj, okazantaj en la korpo, en la cerbo. Animo estas agregato de ideoj k sentoj.

Oni kelkfoje parolas pri "grandanimaj" homoj. Tio signifas, ke ekzistas aliaj, kiuj havas m a l g r a n d a n animon. Estas do eble prezenti al si homojn, kies animo estas tiom eta, ke fakte ili povas esti konsiderataj kiel senanimuloj. Ili apenaŭ pensas, apenaŭ sentas, se oni faras escepton pri iliaj deziroj al satigo de korpaj bezonoj. Ankaŭ bestoj, eĉ plantoj sentas tiujn bezonojn; ili tamen ne pensas, k sekve ne havas animon. Pli precize: ilia pens- k sentaparato estas tiom elementa, ke ĝia funkciado ne povas p r o d u k t i animon.

Estas senanimaj homoj, kiuj tamen scipovas legi; sed ili englutas legaĵon kvazaŭ supon. Se malbonas la supo, ribelas la stomako; sed se la legaĵo estas malvera, ne ĉiam protestas la cerbo. Kaj se la legaĵo estas saĝoplena, ne ĉiam pro tio saĝiĝas la senanima homo.

Senanimuloj ordinare rilatas indiferente ĉu al belo, ĉu al saĝo, ĉu al honesto. Same kiel por blindulo koloroj ne ekzistas.

Homoj senanimaj povas ankaŭ kelkrilate ne esti malinteligentaj: kelkaj eĉ kapablas kapti la unuan lokon liberan en omnibuso, aŭ ie la unuan rangon . . .

Vi denove pensos, ke mi ŝercas, se mi diros, ke homoj ne ĉ i a m havas animon. Tamen tio estas fakto: dum profunda dormado, dum ebriiĝo aŭ similaj statoj senanimiĝas la homo. Tiam kvazaŭ mallumas en la cerbo.

Kolektivo povas ankaŭ havi aŭ ne havi animon. Kiam nur egoistaj, instinktaj motivoj instigas la anojn de iu ajn societo; kiam mankas ĉe ili originala pensado; kiam ili papage ripetas gurditajn "verojn", tiam la afero prosperi ne povas. Ĝi nur vegetas k sin direktas al kadukiĝo.

EKZISTAS MULTAJ MANIEROJ POR PROPAGANDI ESPERANTON

En ruslingva literaturo ekzistas kelkaj romanoj, en kiuj esp-o estas — ĉu tiel, ĉu aliel — tuŝita, priparolita. Tiaj romanoj estas: "Aleksandro Makedona" de Sejfulina, "Interplaneda aventuristo" (laŭvorte "vojaĝisto[1]") de V. Gonĉarov, "Kaj tamen ĝi turniĝas" de I. Erenburg, "Iprit" de V. Ivanov kaj B. Ŝklovskij, "Vojaĝo tra la mondo", rakonto de Kolbasjev, enpresita en la semajna gazeto "Vokrug Sveta" (1928). Estas ankoraŭ du aŭ tri aliaj romanoj, en kiuj esp-o estas priparolata. Samo estas en nova, baldaŭ aperonta romano "Komandarm 2" de Silvinskij.

Ĉu eble ni povos plimultigi la nombron da romanoj kun mencioj aŭ priskriboj pri esp-o? Laŭ miaj spertoj, jes. Mi konatiĝis kun iu unuiĝo de sovetaj verkistoj. Inter la verkistoj mi parolis pri la eblecoj literaturaj per esp-o, kaj la estraro de tiu unuiĝo turnis sin al la anaro kun propono subteni mian ideon.

Alia okazo: kiam mi trafoliumis rusan monatan revuon "Mondo de aventuroj", mi atentis ĝian literaturan konkurson kun monpremioj. En ĉiu n-o la redakcio publikigas rakonton sen ĝia fino. Al la abonantaro estas proponata la tasko verki mankantan finon al rakonto. Kaj en ĉiu n-o la redakcio analizas la alsenditajn solvojn kaj kritikas la verkitajn finojn. La plej taŭga solvo estas presata kaj la sendinto premiata per 100 rubloj. Nu, mi abonis la revuon kaj partoprenis la konkurson, verdire, ne por gajni la premion, sed . . . por propagandi esp-on. Verkante, mi ĉiam espigas la heroojn de rakontoj, devigas ilin lerni esp-on, paroli ĝin kaj interkorespondi per ĝi. La redakcio iom riproĉetas min pro "perforta" esp-igo de herooj, sed tamen f a v o r a s e s p - o n kaj ĉiam mencias miajn solvojn. Tiel dekmiloj da legantoj, ankaŭ novaj kaj malnovaj aŭtoroj, ĉiumonate regule ekscias pri esp-o kaj informiĝas pri ĝia vivo kaj ekzisto. Krome la redakcio rekompencis min per senpaga jarabono.

Do, sovetianoj, subtenu tiun propagand-metodon, dum duonjaro plensukcese praktikitan de mi! Mia deziro estus, ke en "S-ulo" aperu informoj pri ĉiulandaj verkoj, en kiuj esp-o ludas rolon kaj pri similaj literaturaj konkursoj; ke el tiuj verkoj aperu en "La N. E." tradukoj de koncernaj paĝoj; fine, ke rakontoj el "Mondo de aventuroj" kun esp. finsolvoj aperu en "La N. E." aŭ "IL" (organo de SEU) kaj tiucele verkantoj sendu duan ekz-on de sia solvo al la redakcio de "LNE" (aŭ "IL").

I v. L i d i n (41), Moskvo.

[1] Aperis en "Esperanto Hejme", n-o 5 (1925).

La SAT-anoj devas tre atenti, tre zorgi, ke ilia organizo ne fariĝu ia Senanima Asocio Tutmonda . . . E. L.

Proponoj al la 9-a Kongreso

1.

La Jarlibro enhavu la nomojn[1] kaj profesiojn de ĉiuj SAT-anoj. Ĉies adresojn oni, se eble, ankaŭ presigu. — Motivigo: Malfervorigus multajn SAT-anojn la forigo de iliaj nomoj — kaj ĉefe: kono de la profesioj de ĉiuj SAT-anoj ebligas kreskon de faka laboro de SAT-sekcioj (fervojistoj, edukistoj, studentoj, kuracistoj, ministoj, tramistoj ktp. . . .). Aldono: Virinecon oni montru per steleto. Se lokŝparo nepre postulas forigon de tuta profesinomo, profesio estu montrata per cifero laŭ tabelo. (518)

2.

Mi proponas organizi ĉe SAT korespondan gazet- kaj ĵurnal-lernejon. Ĉar, por venkakiri laboristan gazetaron, ni bezonas ne nur korespondantojn-amatorojn, sed ankaŭ bonkvalitajn specialistojn. (7357)

3.

Mi proponas organizadi en diversaj urboj de Orienta Azio ĉiujarajn SAT-konferencojn. Motivigo: Orientazianoj neniam havas okazon partopreni en niaj SAT-Kongresoj. (7357)

[1] Sufiĉus familia nomo k komenclitero de persona nomo.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

"Waldhaus" de la SAJ Rostock dum vintro



Ĉi supran "arbardomon" de la soc. lab. gejunularo vizitos la partoprenantoj de la antaŭkongresa renkontiĝo en Rostock je la 2./3. de aŭgusto 1929. Anoncu vin jam nun ĉe K-do Rudi Graetz, R o s t o c k, Waldemarstr. 17 (Germ.).

K. MARKS kaj **FR. ENGELS**
La Komunista Manifesto
Esperanta eldono
de tiu fundamenta verko de la marksista literaturo
Prezo: 0.60 mk. g.
Havebla ĉe Administrejo de SAT Leipzig O 27

14-a Kongreso de Nederlanda Federacio de Lab. Esperantistoj

La 14-a Kongreso de NFLE okazis 28-an de aprilo en Amsterdam. Ĝi estis bone vizitita; preskaŭ ĉiuj sekcioj estis reprezentitaj. Ankaŭ multaj Amsterdam-aj lab. esp-istoj, inter kiuj rimarkinda nombro da K-dinoj, ĉeestis. La div. raportoj estis aprobataj. Montriĝis, ke la Federacio kontentige progresis, la nombro da sekcioj k membroj grave plimultiĝis. (Estus dezirinde citi nombrojn. — Red.)

La plej grava punkto de la tagordo estis propono de kelkaj sekcioj, ke la Federacio forlasu sian ĝisnunan neŭtralan karakteron k baziĝu sur klas-batala starpunkto. Post vigla diskutado k aŭdinte la bonajn por-argumentojn de la estraro, la Kongreso akceptis ĉi tiun proponon. Ankaŭ la Konvencio inter SAT k la Federacio estis — kun kelkaj negravaj ŝanĝoj — aprobata. Laŭ estrara propono oni decidis ankaŭ akcepti kiel sekciojn lab. esp. grupojn en flandralingva Belgio k ebligi, ke ankaŭ neesp-istaj personoj k organizoj aliĝi al la Federacio kiel subtenantoj. Kiel sekretarion oni reelektis K-don H. W. Alings (Middenweg 226, Amsterdam-Oost). Per kantado de l' "Internacio" la Kongreso finiĝis. SAT-anoj vendis SAT-eldonaĵojn je valoro de ĉ. 20 guldenoj. La Federacio eldonis 50 000-ekzemplere flugfolieton por disdono je 1-a majo.

Nova sukceso de la Federacio. — La Asocio de Lab. Radio-amatoroj konsentis doni al la Ned. Fed. de Lab. Esp. prove dum 2 monatoj ĉiudimanĉe 10 minutojn da tempo por esp. elsendo. Pliaj informoj pri tio aperos en "S-ulo". (670)

"Sprita vorto tentas, nenion atentas[1]"

Pro insisto de la aŭtoro ni publikigas la ĉi suban leteron. Koncerne la "balaaĵojn", pri kies neapero protestas K-do Neniu, ni sciigas, ke jam delonge ili estas forbalaitaj en paperkorbon. — E. L.

Al la redakcio de S-ulo

Mi ricevis vian respondon, en kiu vi sciigas, ke vi ne intencas uzi miajn du senditajn "balaaĵojn", konsiderante ke jam pro la unuaj vi havis multe da malagrabloj.

Kiam mi intencis improvizadi satir-humorajn verketojn, preninte motivojn el la vivo de SAT-anio, por la de mi iniciata rubriko "Balaado ĉirkaŭ la propra domo" mi havis du celojn. Unue plivigligi la tro seriozan enhavon de nia semajna organo, due laŭ ebloj kaj miaj kapabloj, distri la SAT-anaron per pli malpli trafaj aktualaĵoj. Estas ja klare komprenebla por ĉiu pensema homo, ke por humora satiro en stilo kaj enhavo oni devas esti pli drasta per sprito kaj trafo kaj en tiu rilato oni ja ne povas ĉion dissplitigi je bagatela detaleco. Ofte ne gravas, kiomgrade la fakto, liveranta kaŭzon por improvizado, sin bazas je fundamento de pedanta justeco. Gravas nur la celo, esti aktuala, sprita kaj trafa kaj tiel distri la legantojn.

Tial la troan ofendemon de K-do Demidjuk mi taksas vere bagatelema. Des pli, ĉar oni neniam kutimis tro serioze konsideri la enhavon de ia satiro. Multe pli eksponataj personoj ol li estas la celtabuloj por satirhumoraj gazetoj en ĉiuj landoj; nu belaspekta skandalo estus, se ĉiuj tiel bagateleme rilatus al tiuj aferoj, kiel faris K-do Demidjuk.

Pro tio mi apelacias kontraŭ la neaperigo de miaj "balaaĵoj" kaj havas emon indulgi neniajn meritoplenajn eminentulojn kaj pro tio mi akceptas nenian buŝumon por mia plumo, rekomenditan de vi. Do pro tio mi petas, bonvolu komuniki miajn "balaaĵojn", por kiuj la respondecon ja mi havas, aliel mi estas devigata, tute simple abdiki la improvizadon, ĉar nenian cenzuron mi toleras.

Neniu.

[1] El "Proverbaro Esperanta".

TRA LA MOVADO
(Kroniko)

AŬSTRALIO. Perth. La tagaj ĵurnaloj sciigis, ke esp. kongreso okazos en tiu ĉi urbo en oktobro 1929. (Wallace.) — **AŬSTRIO. Wien III.** La grupo de tiu ĉi distrikto okazigis en pasinta aŭtuno 3 kursojn kun sume 155 gekursanoj, el kiuj 45 nun aliĝis al ALLE; dum la sama periodo 5 novaj K-doj aliĝis al SAT. Nun la grupo okazigas sian kurs-finfeston. — **BRITIO. Manĉestro.** Lab. esp. movado nur tre malfacile progresas ĉi tie. Lastjare tamen ni faris sukcesan ekspozicion. Ni sendis delegitojn al Svedio k Sovetio k varbis kelkajn novajn anojn al SAT. (Wylie.) — **ĈEĤOSLOVAKIO.** Ĝenerala kunveno de Lab. Ligo Esp-ista en Ĉeĥoslov. okazis paskon en Praha. Ĉeestis delegitoj de sekcioj: Praha, Plzen-Peklo, Plzen-Karlov, Plzen-Kulturo, Neumer. Kiel gastoj — delegitoj de lab. turistoj k de ĉeĥoslovakaj turistoj. Leteroj de sekcioj Ĉeske Budejovice, Komtaŭ, Neŭdek k salutlet. el Seifhennersdorf (Saksio) k. a. lokoj. Laŭ la raportoj kreskis la membraro dum pasinta jaro je 59 membroj k 5 sekcioj. Sume nun estas 312 registritaj k 126 pagantaj membroj. Oni korespondis kun 27 lokoj en 8 landoj. Bulteno en kvanto de 200 ekz-oj aperas 10-foje jare. La kas-stato estas en bona ordo. Poste sekvis elekto de Komitato. La redaktoro de l' Bulteno alvokas por aniĝo ĉe SAT k LEA k SAT-organoj. — **Plzen.** Lab. esp. societo "Kulturo malfermis en aprilo kurson por komencantoj kun 12 p. Oni instruas laŭ "Petro". — **GERMANIO.** La germ. Lab. Radio-Asocio preparas kvaron-jarlibron, kies unua aperos kun la dato julio/sept. 1929. Ĝi enhavos krom germanlingva parto esp. artikolojn el eksterlando k tiel signifos bonegan propagandon por esp-o. La Asocio eldonis jam prospekton, kiu enhavas ankaŭ esp-an alvokon. — **Chemnitz.** Ĉe la Socialista Junularo estas organizitaj 6 kursoj okaze de l' Junulara Tago en Wien. — **Königsberg.** La loka grupo direktis lastatempe sian ĉefan forton al propagando en la loka lab. gazetaro. Ambaŭ gazetoj estas favoraj al la movado. En "Popolgazeto" aperas regula esp. angulo. (14 074) — **Pirna.** Kurso en la loka grupo de lab. junularo kun 18 partopr., kiuj veturos al Junulara Kongr. en Wien. Gvidas P. Glöckner. Li ankaŭ gvidas novan kurson en supera komerca lernejo kun 20 p. — **JUGOSLAVIO. Zagreb.** Lastatempe la polico arestis multajn laboristojn k studentojn, precipe agitantojn. 12. aprilo K-do Miŝak (SAT-ano 9762), tipografisto, kiu havas ampleksan koresp-adon, estis haltigata en la strato, traserĉata k forkondukata en malliberejon, kie li estas ankoraŭ hodiaŭ. — **NORVEGIO. Oslo.** En aprilo finiĝis progresa kurso kun ekzameno. 6 lernantoj ricevis ateston pri kapableco (4 jam estas anoj de SAT k abonantoj al "S-ulo", 2 fondis novan grupon en sia prof. unuiĝo de stratlaboristoj). En la tramista unuiĝo antaŭ nelonge ankaŭ fondiĝis esp. grupo kun 30 membroj-komencantoj. 2-foje la grupo ricevis subvencion de 100 kr. de la urba tram-societo. La plej aktivaj anoj interrilatas kun eksterl. tramistoj. (102) — **SVEDIO. Sundsvall.** 27. 4. komencis sian laboron studrondo kun 15 partopr. el la pionira taĉmento "Internacio". Gvidas K-doj Wikström k Svärd. La etuloj havas viglan intereson. (12 573)

Ĉe la neŭtraluloj

Paskon okazis en Frankfurt samtempe kun la germana neŭtrala esp. kongreso Konferenco por turismo k reklamo organizita de l' neŭtralaj esp-istoj. Okazis div-lingvaj paroladoj pri reklamscienco, normigo sur kampo de turismo k reklamo, normigo en vojaĝa trafiko, radio, gazeto k reklamo, k. a. La neesp-aj paroladoj estis tradukataj en esp-on. — Vane ni serĉis en la raportoj de neŭtralaj gaz. pri la konferenco ciferojn pri partoprenintaro, ion pri efiko, rezultoj ktp. Ĉu eble tio estas prisilentinda? . . .

Belga neŭtrala esp. kongreso okazos pentekoste en Gent (Gand). Itala esp. kongreso 28.—30. julio en Udine.

En Polio okazas sukcesaj kursoj ĉe instruistoj kaj en mezlernejoj (precipe en Chelm Lubelski); krome okazas metoda propagando ĉe la poŝtistoj, kiu promesas grandajn sukcesojn. La poŝtministro favoras esp-on. Dum ekspozicio ĉi-jara en Pozeno (Poznan) estos farataj specialaj servoj por esp-istoj.

Printempaj monatoj!
Oni ekskursas! Oni kantas!
La
Proletaria Kantaro
estos utilega al vi!
Ne diru, ke ĝi kostas tro multe: Centoble rekompencata estos la mono elspezata por tiu libro!
Prezo: 2,50 mk. g.
Mendu ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio

Tra la esperanta gazetaro

Inter la multaj malplenaj grajnoj, kiujn ni trovas, trapaŝante la kampon de l' esperanta gazetaro, ni renkontas kvazaŭ hazarde iafoje ankaŭ kelkajn atentinde maturajn grenerojn. Ni kolektos ilin kaj alportos sub tiu ĉi rubriko al la observema okulo de niaj legantoj.

* * *

Jen ni vidas esploranta en "Espero Katolika" (n-o 57, 1. 5. 29) pastron Ramboux, kiu estas la gvidanto de tiu gazeto, la kaŭzojn de l' ĝenerale malkontentiga stato de la esperanta gazetaro. Li skribas i. a.: "La plimulto el niaj nuntempaj 'esperantistoj' n u r d u o n k o m p r e n a s esperantlingvan tekston. Ili estas en la sama stato kiel knaboj, kiuj nur scipovas silabi facilan frazon: 'la patro estas bona'. Sekve ili ne aĉetas libron, ili ne abonas gazeton. Ĉu infano, kiu nur silabas lernejajn frazojn, aĉetas literaturaĵon aŭ gazeton? Tute ne!..." Certe tre trafan rimarkon, nerefuteblan, faras pastro R. Kaj ankaŭ bedaŭrinde por niaj SAT-eldonoj tiuj vortoj same aplikiĝas. Sed ni ne komprenas, kial pastro R. miras pri tiu stato? Ĉu liaj kolegoj ne preferas kunvenigi la homojn en preĝejoj, por rakonti al ili fabelojn, ol faciligi al ili la vojon al ĝenerala klerigo?

En "International Language", majo 1929, ni trovas jenan parolon de Teo Jung (direktoro de "Heroldo de Esperanto"), kiujn li eldiris en Frankfurt al la raportanto de "I. L.": "...Spite la nekontentigan vendadon de esp-aj libroj, ni ne devas ĉesigi la eldonadon de novaj libroj kaj la kuraĝigon de niaj verkistoj, kvankam ĉe nia gazetaro mi prefere vidus ioman koncentriĝon kaj unuiĝon... Ankoraŭ ja la neŭtrala movado antaŭenigas esp-on pli ol la fakaj organizaĵoj (? Red.). Ĝi estas ankaŭ la pli etika (!? Red.), ĉar ĝi laboras por la mondlingvo kiel celo mem, dum la fakaj organizaĵoj uzas la mondlingvon kiel rimedon por siaj specialaj celoj. Sed iom post iom la fakaj organizaĵoj estas superantaj la neŭtralan movadon. (Nu, do! Red.) Supozeble la malkreskon de la neŭtrala movado kaŭzas grandparte la emo malkonfesi aŭ eviti ĉe ni la altajn principojn defenditajn de Zamenhof en lia 'interna ideo'..."

Ĉu s-ro Jung kredas, ke lia elstarigo de l' mistika "interna ideo" kun samtempa cito de la spirito de Zamenhof povus konvinke efiki je la pli racia plimulto da esperantistoj? Tiuj ja ellernis esperanton por havi el ĝi iun praktikan utilon, kiun povas doni al ili nur la "fakaj organizoj", kies plian kreskadon cetere J. mem devas profeti. S-ro Jung devas lerni kompreni, ke "altaj principoj", kiuj sin bazas ne sur realaj faktoroj de la vivo, perdas sian valoron. N. B.

Ni rekomendas al vi nian literaturon!

Postulu la plej novan katalogon ĉe **Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**

Nia Lingva Angulo

Demandoj: 1. Ĉu estas korekte diri: "mi f r o s t a s ĉe la fingroj ktp. aŭ ĉu oni devas diri: "mi s e n t a s f r o s t o n..."

2. En "S-ulo", en "For la neŭtralismon!" k aliaj SAT-eldonaĵoj oni ĉiam trovas la vorton "Esperanto" skribita per malgranda komenclitero. Ĉu tio estas korekta? (6707)

Respondoj: a) Tial ke la senco estas klara, oni rajtus diri, ke tiu formo estas korekta; tamen ĝi ŝajnas al ni nerekomendinda. Diru: miaj fingroj ktp. frostas; aŭ froston mi sentas ĉe la fingroj.

b) Estas same korekta kiel, ekzemple, pri s a n s k r i t o (vidu KABE) aŭ l a t i n o. Fakte ne ekzistas en la F u n d a m e n t o regulo pri tio. Esperanto estis la pseŭdonimo de Zamenhof k ŝajnas al ni ridinde samigi lingvon kun homo. La personoj, kiuj rilatas mistikeme al nia afero, uzas grandan literon, same kiel kreduloj ĉe la vorto dio. H e r e z u l o.

Protesto. — Treege mirigite mi legis mian nomon sub rubriko "Plendoj" en "S-ulo" (238). Mi ĉiam respondis al ĉiuj miaj gekorespondantoj, eĉ se nur neante. Eble K-do Kluev, la plendinto, skribis tre longe post apero de mia koresp.-anonco aŭ estas unu el tiuj K-doj, kiuj skribis nacilingve sian adreson, tiel ke mi ne kapablas deĉifri ĝin. Mi ege bedaŭras, ke K-do K. prezentis min kiel malfidindulinon, sed miaj gekoresp-antoj certe pravigos min, kiam mi diras, ke mi ĉiam faris mian devon klaskonscian. — Lenjo M ä r z (9498, edzino), Mannheim.

Ni jam sukcesas!

Certe tio estas nur komenco — sed vigla k esperiga. Tio estas nur unua hirundo, sed post ĝi ja venos hirundaro, k kun hirundaro — la printempo. Nia unua sukceso, la unua internacia manpremo ricevita, atingis nin ĝuste dum antaŭtagoj de majo, ĝuste antaŭ la festo de internacia solidareco proleta. — La ukrainiaj radio-aŭskultantoj, anoncintaj sian alvokon en "S-ulo" (233), jam ricevis fratan saluton de nia K-do E. M. el la lando de soldatbota diktatoreco. La K-do sciu, ke la respondo jam estas sendita senpere. (Sed ĉiu ne pli bone, trovi peranton?) Kaj ĉiuj sciu, kiel estas traktita lia letero.

1. Samtage ĝi estis legata antaŭ mikrofono por la radio-kursanoj. 2. La kursanoj nun pretigas kolektivan saluton k individuajn leterojn al li. 3. La teknikaj demandoj de l' K-do tuj estas responditaj al li persone. 4. En la per-radia jurnalo "Proleto" (ukrainlingva) estis disaŭdigata speciala artikolo sub titolo "Saluto trans miloj da kilometroj". 5. Granda lab. jurnalo "Ĥarkova Proleto" akceptis artikolon pri "Ligo de radio k esp-o", kie ankaŭ la letero de l' K-do plejparte estis reproduktata. 6. En la radioekspozicio nun preparata la letero kun aliaj ricevitaj estos elmontrata. 7. Fine, kiel vi vidas, "S-ulo" estis informata. Do, estu plue plektata nia reto el radio-ondoj, poŝto, gazetaro. Kiu deziras partopreni? Kiu sekvos la unuan hirundon?

Ĥ a r k o v , R a d j a n s k i m a j d a n, Radioupravlinnja (5221).

KOMUNIKO

Ni ricevis jenan leteron:

"Tiflis, la 25. III. 1929.

Karaj K-doj!

La Tiflisa Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo kaj loka SAT-anaro sciigante, pri aresto de

René Naville, SAT-ano n-o 2042,

atentigas vin pri subaj linioj kaj petas eksigi R. Naville konforme al § 8 de l' Statuto.

Esperantisto de 1922, Naville estas sufiĉe konata en SAT-anio, ĉar li vigle korespondadis kun multaj Gek-doj; pasintan aŭguston li partoprenis nian VIII-an kiel reprezentanto (neoficiala) de Tiflisa esperantistaro kaj estis elektita en la honoran prezidantaron de solena malferma kunsido. Plue, la 18. VIII., en la fakkunsido de l' sciencistoj kaj studentoj, kiun N. ĉeestis kiel studento de l' Transkaŭkazia Komunista Universitato, li estis elektita kiel landa (Transkaŭkazia) reprezentanto por informservejo de l' Akademia Sekcio de SAT.

Celante sciigi la Gek-dojn, interrilatintajn kun N., kaj eviti eventualajn miskomprenojn kaj plendojn pro nerespondo, ni petas vin aperigi ĉi sciigon en la plej proksima n-o de "S-ulo".

Kun kamarada fratsaluto
R. Lorencson,
Sekretario de T. K. de S. E. U.

"P. S. Laŭ oficiala sciigo, publikigita la 23. III. en regiona jurnalo "Zarja Vostoka" (Matenruĝo de l' Oriento), Tiflis, René Naville estas estono Johannes Niggols. Siatempe kondamnita al morto pro peramila rabo kaj mortigo, N. en 1923 transiris la limon kaj fuĝis en Leningradon, kie li sin prezentis kiel politika elmigrinto. Transveturinte Krimeon, kie li lerte sukcesis enpenetri en la junkomunistan organizaĵon, kaj poste Abĥazion (Nigramario), N., elpensinte longan revolucian biografion, sukcesis okupi bonan postenon. En Tiflis N. partianiĝis kaj studentiĝis ĉe Transkaŭkazia Komuniversitato en Tiflis, samtempe okupante postenon en unu el ŝtataj entreprenoj.

En fino de l' pasinta jaro; antaŭvidante fiaskon de sia "revolucia kariero", N. estis fuĝonta translimen sed estis arestita kune kun sia kunulo, monfalsisto Eduardo Movejl."

R. L.

Laboristaj Radio-aŭskultantoj!

Prof. d-ro Dietterle, direktoro de germania Esperanto-Instituto, parolas esp.-lingve ĉiun 2-an vendredon je la 18-a 5 min. laŭ M. E. T. pri: "Laboro k ideoj de d-ro Zamenhof" en la sendstacio Leipzig — ondo 361,9. Jam antaŭ kelkaj jaroj tiu ĉi sendstacio disaŭdigis esp-e la veterprognozojn. Ĉar niaj K-doj ne montris sufiĉe da intereso por tiu afero, oni ne daŭrigis ĝin. Sed laŭ mia opinio la sportuloj inter ni tre ofte bezonas veterprognozon, do ili postulu ĝin per nia lingvo.

Por disvastigi esp-on inter la radio-aŭskultantoj k utiligi ĝin por niaj lab. celoj, ni ankaŭ postulu aranĝadon de esp.-kursoj por komencantoj k progresintoj. Nia prol. kulturmovado nur marŝas antaŭen per esp-o. Do, ni estu aktivuloj! Esprimu letere al M i r a g , Leipzig, vian dankon pro disvastigo de esp-o per radio kaj petu esp. sendojn precipe vesperajn. Skribu multnombre!

A l b e r t L e h n s (10245).

Korektoj

En la artikolo "Ĉirkaŭ la Diskutejo" (n-o 239, pĝ. 291, 2-a kolono, 8-a linio de supre), oni bonvolu legi incito anstataŭ "incita", narkoto anstataŭ "narkota".

Kripligita estas tuta frazo en pĝ. 288. Oni devas forstreki la lastan linion en la unua kolono k. ankaŭ la tri sekvantajn liniojn; anstataŭe oni devas enmeti jenan tekston: "saviĝi el siaj pekoj. Ĉiuj vizitantoj ricevas la nomon 'meĥedi'; sekve, se iu havas la nomon Mahomed Kerim, li devas aldoni ankoraŭ la nomon Meĥedi (Mahomed Kerim).

En la artikolo "Financa Superregado en Usono" (pĝ. 286) la vortoj "kontroli, kontrolo" estas kelkfoje uzataj en la senco de "superregi, estrado", ĉar en angla lingvo la vorto "control" havas ankaŭ tiun sencon. Oni priatentu tion!

En n-o 239, pĝ. 286, linio 42, la vorto "atingata" erare lokita, devas troviĝi en linio 43 antaŭ "pli".

Por la 9-a SAT-Kongreso

Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
Leterfolioj kun kovertoj: 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

Je la nomo kaj adreso de la administranto ni instalis poŝtĉekajn kontojn en:

Bruxelles, konto n-o 227 848
's-Gravenhage, konto n-o 142 084
Kobenhavn, konto n-o 14 938
Leipzig, konto n-o 6835
Praha, konto n-o 501 007
Stockholm, konto n-o 4268
Warszawa, konto n-o 191 335
Wien, konto n-o D.- 137 725
Zagreb, konto n-o 40 040
Zürich, konto n-o VIII. 15 929

En **Paris** funkcias sub la nomo de nia Asocio jena konto: C. 1234—22.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

De Tribune, Amsterdam, 22. 4., Ŝpinistinoj venkis (236).

Represis el "La Lern.":

De Tribune, Amsterd., 9. 3., Mia letero (n-o 2).

Priesperantajn artik. k notojn enhavis:

De Strijd, 23. 2.; De Tribune, Amsterd., 23. 3., 10. 4., 19. 4., 30. 4.; Echo des Ostens, Königsberg, 1. 3., 27. 3., 10. 4.; Volkszeitung, Königsberg, 12. 2., 16. 2., 25. 3., 10. 4., 11. 4.; Arb. Sportzeitung, Königsberg, 25. 2.; Las Noticias, Barcel., 21. 4.; Accion Cooperatista, Barcel., 26. 4.; La Libertad, Badajoz, 23. 3.; La Aurora Social, Oviedo, 19. 4.; El Socialista, Madrid, 23. 4.; Signalen, Stokh., 25. 4.

Pri la 9-a SAT-Kongreso raportis:

Virradal, Montreal, 12. 4.; Volkszeitung, Königsberg, 15. 4.; Echo des Ostens, Königsberg, 10. 4.

Peresper. materialon enpresis:

Travail, Lyon, 27. 4.; De Tribune, Amsterd., 7. 3., 12. 4., 13. 4., 22. 4., 26. 4., 30. 4. (ĉi ĉiuj n-oj enhavis koresp. el Sovetio).

NIA POŜTO

7319. — Estas tro taksi la nunan influon de SAT, kredi, ke ĝi povas sukcesigi vian cetere subtenindan proponon. — E. L.

4967. — Jes, aperos via versaĵo.

14 074. — Vi eraris sendube pri la adreso: viajn proponojn pri ŝanĝoj en nia lingvo vi devus direkti al la Lingva Komitato, ne al ni. — E. L.

1741. — Tiu ĉi vortaro kostas 1,20 mk. g. k ne nur 1,— mk. g. Adm.

K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Franz Mittermayer, Wienerreichstr. 2-a, Linz a. D., dez. koresp. k interŝ. PM kĉl., prefere kun Sovetio.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Ferko Sommer, Legionarŭ, 1, Hodonin, dez. interŝ. PM kun Gek-doj el ĉl.

K-do Pravoŝ Koĉiŝ, Zidovska, 1, Hodonin, volas interŝ. PM kun Gek-doj el ĉl.

K-do E. Ormaniec, Orlová, 623, Slezsko, dez. koresp. kĉl., pri div. temoj, L, PK, PI. Certe resp.

FRANCIO

— Naturamikoj sendu vian regionan naturamik. gazeton, interŝ. vi ricevos la nian "Les Amis de la Nature". Adr.: K-do J. Wutte, Oberbetschdorf, Bas-Rhin.

GERMANIO

— LEA-grupo dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj. Adr.: K-do L. Keil, Kirchseeon ap. München, 45.

— Fotoamatoroj dez. interŝ. fotojn. Sendu multnombre! Certe resp. Adr.: O. Brückner, Kantstr. 3, Planitz i. Sa.

K-do K. Lucha, Harthau b. Chemnitz, dez. koresp. kĉl., nur en Internacional Stenografio.

Filatelistoj atentu! — K-do Erwin Mössmer, Stuttgarter Str. 179, Geislingen-Steige, dez. interŝ. PM kĉl. Bonvolu afranki filateliste.

K-dino Mia Antwerpen, Citadellstr. 12, Düsseldorf, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj.

K-dino Johanna Becker, Binterimstr. 3, Düsseldorf, dez. koresp. kĉl., pri ĉ. temoj.

— 2 j. K-doj dez. koresp. kun eksterl. gejunuloj pri ĉ. temoj, L, PI. Same ni koresp. kun tiuj, kiuj veturos al la "Junular-renkonto" en Wien. Resp. gar. Adreso: K-doj Paul Täuber k Willy Mehnert, Mittel-Schreiberhau i. Rsgb., Nr. 238.

K-do Max Nekola, Schäfferstr. 7, Bautzen i. Sa., dez. koresp. pri div. temoj kun Afriko, Aŭstralio, centra k suda Ameriko.

K-do W. Deppe, Oidtweilerweg 11, Alsdorf b. Aachen, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, pref. interŝ. fotojn kun Gek-doj fotoamatoraj. Resp. garantiata.

— Gekursanoj dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, bfl. Skribu multnombre! Certe resp. Adr.: Johannes Köhler, Neugraben 5, Bautzen i. Sa.

HISPANIO

K-do Daniel Pons, str. Sallans, 37, Sabadell, dez. koresp. pri laborkondiĉoj kĉl., L, PK, PI.

SOVETIO

K-do N. Lucko (12 j.), Karl Libkneĥta, 25/1, Minsk, koresp. pri infanvivo, interŝ. ilustr. inf. gaz., PK, PI.

— Esp. rondeto dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Resp. garantiata. Adr.: A. Birjulin, st. Podsolneĉnajo, Oktjabr. ĵ. d.

K-do Zenjka Rozental (junulo), Sovetskaja, 26, kv. 9, Minsk, koresp. per L, PK, PI, PM, il. gaz.

K-dino Manjo Kopeloviĉ, Zamkovaja, 2, kv. 12, Minsk, koresp. per L, PK, PI (junulino).

K-do N. Kalaŝnikov, Sartana, Mariupol. okr. Kol. "A", 41, kv. 7, dez. koresp. kun gejunuloj el ĉl., L, PK, PI, il. gaz. Resp. garantiata.

K-do Paŭlo Assejev, Sartana, Mariupol. okr. Kol "A", 12, kv. 1, dez. koresp. kun gejunuloj el ĉl. Resp. gar., L, PK, PI.

K-do I. K. Boĵkov, Ĉernjaevskaja, 14, Rostov (Don), dez. koresp. kĉl. kun junkom-istoj k gelernantoj pri viv- k lernkondiĉoj k. a. temoj.

K-do Elio Riss, Malo-Sadovaja, 105, kv. 6, Rostov (Don), dez. koresp. kĉl., precipe pri labora juro. Certe resp.

K-dino Viol. Dmitrieva (19 j., brodistino), Kooperat. per. 2, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri lab. vivo, jun. movado k. a. temoj.

K-do Gerŝkoviĉ (17 j., metaltornisto), M. Morskaja, 24, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri lab. vivo, jun. movado k. a. temoj.

— 2 j. belaj knabinoj (17 j.), deziras interŝ. PI, fotojn, L, PK kun eksterl. junularo k lernantaro pri ĉ. t. Resp. garant. Adr.: K-dinoj R. Jevzikova k N. Gulajeva, str. Korolenko, 1-a, Sovŝkola, Barnaul.

K-do K. Gurov (studento-sportulo), Teĥnikum Fizkulturi, Stalingrad, dez. koresp. kĉl. L, PK, PI, sport-PI k sport-gaz. Resp. garantiata.

SOVETIO (daŭrigo)

K-do Voldemaro Bobrov N. Moĥovaja, 3, Smolensk, invitas siajn malnovajn koresp-antojn renovigi koresp-adon k serĉi novajn el ĉl., pri div. temoj.

Agr. A. Romanjuk, Andruszowka, Berdiczewsk. okr., Ukrainio, interŝ. L, PK, PI, PM, kĉl.

K-do Georgo A. Taratorin, Nerĉinsk, Sretensk. okr., D. V. R., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do I. Mosolov, Dvorec-muzej, kv. 8, Trock, Leningr. obl., dez. koresp. pri aviado k. a. temoj, kĉl.

K-do S. Pivovarov (studento), Lesoteĥnikumo, st. Puŝkino, S. Ĵ. D. (Norda fervojo), Mosk. gub., dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, ankaŭ pri radiaj k sportaj temoj. Interŝ. L, PK, PI, nacilingv. il. gaz. Resp. garantiata.

K-do V. Bratanovski, Sovetskaja, 37, Ĉimkent, Kazakstan, dez. koresp. pri lab. k junulara vivo, L, PK, kĉl.

K-do Krotkov (bestkuracisto), Krasnoznamjennaja, 4, Nikolsk-Ussurijsk, Siberio, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Resp. garantiata.

— Grupo de gelernantoj dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PI. Adr.: K-do P. Vidusov, Medicina Instituto, Omsk, Siberio.

— Zavitaja ŝaka rondeto elvokas eksterlabor-rondetojn k apartajn fortajn ŝakludantojn por vetludo el du partioj. Adr.: Zavitaja, Amurska okr. al K-do N. E. Dulebov.

K-do B. M. Girev, st. Belinskogo, 82, Sverdlovsk, Uralo, dez. koresp. kĉl., pref. L, kolektas vidaĵkartojn. Resp. garantiata.

K-do N. Koĵevnikov, P. O. St. Raĉejka, Sizransk. okr., dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PK. Nepre resp.

Gek-doj Ĵabskij, Likova, Ĵabskaja, Hustina, Roĵanskaja, Semenova, Ĉurikova, Klubo Ĵeldor, Krasnodar, I., dez. koresp. kĉl., PK, PI. Resp. garant.

— **Geesp-istoj atentu!** Esp. rondeto el Siberio dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Resp. ĉiam garantiata. Adr.: Omsk, str. de Karl Libkneĥta, 80, ŝkola Nr. 6, Esperanto.

K-do Viktoro Zimin (22 j., teknikisto, vizitos SAT-kongr.), st. Misovaja Zabajkalskij ĵ. dor., Kontora 3 uĉastka Puti, serioze koresp. kĉl., ĉefe pri tekniko k inventaĵoj, L, PK, PI kun teknikistoj k komjunuloj. Dez. retrovi malnovajn koresp-antojn.

K-dino R. Adlivankina, Pl. Svobody, 13, kv. 15, Minsk, koresp. kĉl., L, PK, PI.

USONO

K-do Friedman Meyet, 1185 Lebanon street, New York City, N. Y. dez. koresp. kun Gek-doj sovetiaj, svedaj, litovanaj k ceteraj ekstereŭropaj. Certe respondos.

Adresŝanĝo: K-do Georgo Gabor (SAT 10 252) New York City anoncas, ke sia 1928 jarlibra adreso ne plu validas. Nuna adreso estas: K-do Georgo Gabor Cafeteria, 350 East 81 st street, New York City (Usono).

Artlaboristoj, atentu!

Voko de l'"Avangardo"

Kio estas "Avangardo"?

Periodaĵo de samtitola ukrainia artista grupiĝo, kies arta direkto estas konata sub la nomo de "konstruisma dinamismo" aŭ "spiralismo".

Kion deziras "Avangardo"?

Respeguli vivon, evoluon kaj sukcesojn de artoj kaj de artlaboristoj en ĉiuj branĉoj (literaturo, muziko, pentrado, skulptado, teatro, kino, foto, arto de hejmobjekto — meblaro, vazaro ktp.). Kunlaborigi viglajn avangardajn kulturfortojn el ĉiuj landoj de l' tutmondo.

Kiel agas "Avangardo"?

Aperigas parton de sia enhavo ne sole en ukraina lingvo, sed kun paralelaj tradukoj en aliajn lingvojn (anglan, francan, germanan) kaj en esperanton. Presigas iufoje verkojn en aŭtora lingvo kun paralela ukraina traduko. Nepre donas resumon siaj kajeroj en iuj el naciaj lingvoj kaj en esperanto.

Kiujn ekzemplojn de tia agado "Avangardo" povas prezenti?

En la ĵus aperinta n-o oni trovas: 1. originalan poezion de K-do E. Miĥalski "Lulkanto" presitan en esperanto kun paralela versa traduko de ukraina poeto V. Misik; 2. la "Manifeston de Avangardo", presitan germanlingve; 3. resumon de enhavo en germana kaj en esperanto.

Kiel "Avangardo" serĉas amikojn kaj kunlaborantojn?

Ĝis nun — modeste per individua korespondo ĝi agis. El 9 landoj peresperante "bombarditaj" tute ne resonis Danio, Norvegio, Portugalio, Turkio; rifuzis pro manko da kulturfortoj la Sudafrika Unio; promesis kunlaboradon Alĝerio, Holando; komencis klopodojn Belgio, Svedio. (Kun Francio, Germanio k. a. ligo estas aranĝita sen helpo de esperanto.) Nun ĝi alvokas per "S-ulo" simpatiantojn el ĉiuj landoj!

Kion sendi al "Avangardo"?

Originalajn belartajn verkojn (prozo, poezio); artikolojn pri arta vivo kaj pri tiu de artlaboristoj; skizojn pri ekzistantaj arttendencoj, iliaj gvidantoj kaj socia fizionomio; bildojn kaj fotojn; kiuj reproduktas artobjektojn (pentraĵojn, skulptaĵojn, spektaklojn ktp.) kaj reprezentas artistojn.

En kiu lingvo oni skribu al "Avangardo"?

En angla, franca, germana, pola, rusa, ukraina, esperanta. Se en iu alia — kun nepra traduko en unu el la cititaj.

Kiel rekompencas "Avangardo"?

Sendante ekzempleron de la revuo al ĉiu aktivulo, kies materialoj estas uzitaj; pagante honorarion da ĉ. 30 dolaroj por 1 presfolio (40 000 tiposignoj).

Kiel ricevi n-on 1 de 'Avangardo'?

Sovetianoj sendu 1 rubl. 10 kop. laŭ redakcia adreso (v. sube). Alilanduloj 0,75 dol. aŭ sin turnu al SAT atendu specialan anoncon.

Kunlaborontoj skribu al la redakcio:
USSR, Ĥarkov, Avangardo, Puŝkinski vjizd, 6/9.

"Sennaciulo"

n-oj 170 ĝis 182, ambaŭ inklusive, kaj 191, ĉiuj el 1928, serĉataj. Proponon al Luis Fernández, Luchana 8, Bilbao (Hispanio).

Gek-doj vizitu Manĉestron!

Ĉiuj alilandaj Gek-doj, kiuj havos okazon, veni Briton, ne preterlasu la okazon, por viziti Manĉestron (Manchester), la internacian centran lokon en speciale interesa parto de Britio. La klasika urbo de l' kapitalismo! Vigla, solidareca rondo el lab. esp-istoj ĝoje akceptos vin! Skribu al K-do Frank Elder (por Laborista Esp. Klubo), 114, Duke Street, Stretford Rd., Hulme, Manchester (Britio).

Al ĉiuj SAT-anoj!

Ateista Unio en USSR organizas en Moskvo en estinta monaĥejo kontraŭreligian muzeon. Inter aliaj fakoj en la muzeo estas kreata la fako, dediĉita al agado de eklezioj k sektanaj organizoj ĉiuspecaj en diversaj landoj. Pro tio ni petas vin, esperantistojn proletajn, sendi al ni materialojn por ĉi tiu fako, verkitajn en esperanto.

Ni dezirus ricevi librojn gazetojn k ĵurnalojn alvokojn, flugfoliojn, fotojn, afiŝojn, insignojn, deviz-afiŝojn ktp., ĉu kontraŭreligiajn, liberpensajn, ĉu religiajn, verkitajn en esperanto.

Interŝanĝe ni povas sendi niajn eldonojn: librojn, broŝurojn, gazetojn, ĵurnalojn, afiŝojn ktp.

Kun proleta saluto
Je la nomo de Centra Konsilantaro de Ateista Unio en USSR,
M. Scheinmann.

Nia adreso: Sovetio. Moskvo, Sretenka 10 "Bezboĵnik".

Internacional-stenografio

en ĉiuj lingvoj. Gvidilo por Esperanto 1 mk. g. + 10% sendkostoj. Gvidilo en aliaj lingvoj.

Instituto de Internacionalstenografio Duisburg, Friedensstrasse 79, Germ.

ENHAVO:

	paĝo
Deklaro de la SAT-Direkcio . . .	309—10
Pri la mezgermania industriregiono	310—11
El Usono	311
Infanlaboro en Ĉinio	311—12
La kooperado en Hindio	312
Oni plenumas manifeston de "10 Jaroj de Oktobro"	312
El Meksikio	312—13
Justeco en Francio	313
El Italio, la paradizo de l' faŝismo	313
Ruĝa urbeto en blankterora lando	313—14
sen grandaj literoj	314
El la Historio de l' Socialismo . .	314
Diskutejo	314
Sennaciula Liberpensula Paĝo . .	315
Tra Esperantio	316—19
Korespondado, Anoncoj	319—20

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)